HUNGARA VIVO

5
1979
11,- Ft

KOMENCU ĈE SKALA!

NI ATENDAS VIN

de la 8-a horo ĝis la 19-a horo en nia sekcio

de multspecaj industri-varoj

de la 7-a horo ĝis la 20-a horo en nia nutraj-sekcio

SKÁLA

Kliento-servo: 850-850

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest,
Pf. 193, H–1368
Aperas dumonate
XIXa jaro, 1979 n-ro 5
(87)

ENHAVO

Benczik, V.: Hungaraj vinoj 162
Kapitány, L.: „Amikeco–1" kaj „Amikeco–2" 163
Benczik, V.: „Librofabriko" en Budapeŝto 164
Benczik, V.: Modela vivo 165
Mihalkov, G.: Vivo dediĉita al Esperanto 165
Mihalkov, G.: Mia revo 166
Spertoj agrablaj kaj utilaj 167
József, A.: Kiam karulin' surstrate trairis . . . (*Fejes*, M.) 167
Halász, Z.: Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo 11. *(VHZS)* . . 168
Torda, I.: Jarcentoj de la hungara literaturo 3. (*Rados* P. A.) 170
Golden, B.: La venĝo 172
Izes, M.: Al Zsuzsa Koncz (*Fejes*, M.) 173
Illés, E.: Dilaŭdido (*Varga-Haszonits*, Zs.) 175
Áprily, L.: Peto al oldeco (*Varga*, J.) . 176
Váci, M.: Deveno (*Varga*, J.) 178
Gergely, M.: La sonĝo de naiva pentristo 179
Farkas-Tatár, É.: Panoramo 180
Soós, Ê.: Versaj korespondaĵoj 182
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 183
Csontos, G.: Naŭzaj tagoj (*Fenyvesi*, E.) 184
László, F.: La rolo de akvomastrumaj kompanioj en la hungara akvomastrumado 186
Bálint, Sz.: La defraŭdanto 194
Recenzoj de V. *Benczik*, T. *Vaskó* . . 195
Originala Esperanto-poezio 196
Serpentino, Ekzameno sen risko, Malplena Vortaro 199
Leterkesto, Korespondi deziras 200
Sur la kovrilpaĝo: Rikoltado de vinberoj (Foto: MTI) . . . . . .

Estus bone scii...

kiam tiu ĉi numero atingos Vin, Afabla Leganto? Nun, kiam mi surpaperigas tiujn ĉi liniojn, junio-meza varmego provas la rezistkapablon de la homoj en Eŭropo. Laŭ niaj intencoj post tri monatoj – do, meze de septembro – ĝi devus troviĝi en Via poŝtkesto, sed redaktoro proponas, presejo disponas . . . Tamen, se tiu ĉi numero atingis Vin antaŭ la fino de septembro, Vi povas esti certa, ke la lasta ĉijara numero alvenos nur du monatojn poste (t.e. en novembro), kaj la aperritmo de HV finfine *vere* reguliĝos.

Sed se HV atingis Vin kun malfruo, espereble konsolos Vin ĝia pliboniĝanta teknika kvalito kaj enhava varieco. Tiun ĉi numeron enkondukas tre agrabla temo: artikolo pri la hungaraj vinoj. Ĝin sekvas temo eble ne tiel agrabla, sed sendube aktuala: la nafto. Hungario eksportas vinon, kaj importas naftON. Pro tio ni devas ŝpari pri nafto, dum koncerne vinon ni troviĝas en stato de abundo. Bedaŭrinde, niaj malinteligentaj aŭtomobiloj ne volas atenti tiun cirkonstancon, kaj obstine rifuzas funkcii per vino . . .

Ĉar dum aŭtuno la vesperoj fariĝas pli longaj, en tiu ĉi numero Vi trovas pli da literaturaĵoj. Aperas eĉ tri beletraj prozaĵoj, inter kiuj elstaras longa rakonto de Endre *Illés*. Ni hezitis iom, ĉu ĝi ne estas tro longa por nia revuo, sed fine tamen decidis presigi ĝin. Volonte ni legos Viajn reflektojn pri tiu decido.

Aperas artikolo pri la grandskala libroeldonado de HEA, eseeto pri la *Rimleteroj* de *Auld* kaj *Boulton*, persona konfesaĵo de nia bulgara kunlaboranto G. *Mihalkov* pri la hungara literaturo, kaj kompreneble daŭrigo de la historia kaj literatura serioj.

Ni salutas ankaŭ du elstarajn esperantistojn: kamaradon Nikola *Aleksiev*, kiu en junio fariĝis sepdek-jara, kaj la hungaran veteranon d-ron Lajos *Győry-Nagy*, kiu eklernis Esperanton kune kun *Kalocsay* – antaŭ 67 jaroj.

Unu el la kulturaj respondeculoj de HEA, P. A. *Rados* raportas pri la peresperanta kultura kunlaborado de kvin landaj asocioj en Orienta Eŭropo: eble tiu agado meritus imiton ankaŭ ĉe aliaj regionaj grupoj de asocioj.

Novspeca krucenigmo povas akiri agrablajn horojn por tiuj, kiuj ŝatas trejni sian cerbon: la aŭtoro esperas, ke tiu novigo ne malpliigos la nombron de la solvantoj.

Fine ne forgesu, ke alvenis la tempo de reabonado por 1980, precipe en socialismaj landoj, kien importas nian revuon ŝtataj firmaoj. Ni petas niajn legantojn ne nur reaboni HV, sed ankaŭ trovi en sia klubo almanaŭ unu esperantiston, kiu volonte ricevus dum la venonta jaro belaspektan – kaj espereble regule aperantan – Esperantan revuon kontraŭ modesta prezo.

Hungaraj vinoj

Kiam eksterlandanoj iom post iom ekkomprenis, ke Hungario ne plu estas lando de koleremaj paŝtistoj, fulme rajdantaj tra la vastega „pusto" (nekulturita ebenaĵo), ili komencis asocii al la nomo de nia lando futbalon kaj vinon.

Koncerne futbalon . . . nu, la revivigo de pasintaj gloraj tagoj agrable forpelas enuon, sed la aktualaj aspektoj de tiu sporto nepre evitindas por iom fiera hungaro. Ne estas same pri la vino, kiu rajte estas unu el la plej konataj kaj ŝatataj „hungaraĵoj" tutmonde.

26 litroj jare

Oni volonte kredas, ke hungaroj trinkas multe da vino. Tio estas fakte eraro, ja la vinkonsumado por persono en nia lando estas 26 litroj jare, kaj kompare al la 145 litroj de francoj aŭ 125 litroj de portugaloj tio estas vere modesta kvanto. Tiuj 26 litroj certigas por hungaraj vin-trinkantoj nur la 11 an lokon sur la monda listo. Ni trinkas kvinoble pli da biero ol vino, kvankam la prezo de biero en Hungario estas relative alta, kompare al la prezo de vino.

Vinberoj sur 206 000 hektaroj

Kiam la nomadaj hungaroj fine de la 9-a jarcento alvenis en la basenon de Karpatoj, ili jam trovis ĉi tie vastajn kaj bone prizorgitajn vinberejojn. Tial la vinproduktado ĉiam estis unu el la plej gravaj – kaj prestiĝaj – branĉoj de la hungara agrikulturo.

Nuntempe sur 206 000 hektaroj kreskas vinberujoj en Hungario. Tiu teritorio liveras al la lando 5 milionojn da hektolitroj da vino jare. Duonon de tiu kvanto ni mem fortrinkas, la alia duono estas eksportata, ĉefe al Sovetio, FRG kaj Aŭstrio.

Tokaj kaj Eger

Onidire Madame de Pompadour diris la jenajn vortojn al Ludoviko 14-a, kiam tiu regalis ŝin per vino de Tokaj: *„C'est le roi des vins et le vin des rois."* (Ĝi estas la reĝo de vinoj, kaj la vino de reĝoj.) Estus malfacile pruvi la aŭtentikecon de tiu diraĵo, sed la monda kariero de la vinoj de Tokaj konfirmas, ke la fama sinjorino almenaŭ povus diri ion similan. *Erasmo, Montesquieu, Voltaire, Goethe, Anatole France, Pablo Neruda* kaj multaj aliaj famuloj trovis flatajn vortojn por la vinspecialaĵo de la orient-hungara urbeto Tokaj, atribuante al ĝi eĉ kuracan efikon. Laŭ iuj asertoj la vino de Tokaj nuntempe en Tokio vendiĝas en apotekoj. (Ĉu eble iu el niaj japanaj legantoj povus kontroli tion?)

Dum Tokaj famiĝis per siaj pezaj, dolĉaj vinoj, la urbo Eger donis al la mondo eminentan acidetan vinon, kun tre impona nomo: *taŭrosango (bikavér)*. Ĝi same populariĝis, kiel la vino de Tokaj, tamen en malpli vastaj dimensioj.

Krom Eger kaj Tokaj estas ankoraŭ pluraj famaj vinregionoj en Hungario, tamen sendube la supre menciitaj du pleje meritas esti konataj ankaŭ eksterlande.



Montoj kaj ebenaĵoj

En Hungario estas malmultaj montoj: la plej granda parto de nia lando estas ebena. Por kreskigi la vinproduktadon, iom post iom oni plantis vinberujojn ankaŭ sur ebenaj teritorioj, precipe en la regiono inter Danubo kaj Tiso. Laŭ ĝenerala opinio, la kvalito de vinoj, produktataj sur ebenaĵoj, postrestas al tiu de la montaj vinoj. Tamen, iom ekzakta kontrolo montris surprizan rezulton: dum la lasta jardeko ebenaĵaj vinoj gajnis pli da oraj medaloj en landaj kaj internaciaj konkursoj, ol la „sukoj de montoj". Kio estas la vero?

Desegnaĵoj de I.Fábián

Tradicioj kaj spertoj

La famo de la hungaraj vinoj ŝuldiĝas ne nur al la favoraj klimato kaj grundo de la vinproduktaj regionoj, sed ankaŭ al la pli ol miljara tradicio de vinberkulturo, kaj al la spertoj kaj persista laboro de la hungaraj vinberkultivantoj.

Septembro kaj oktobro estas sezono de la kolektado de vinberoj. Viglaj manoj ensteligas nun tiujn fruktojn, kies agrabla suko notinde kontribuos al la gajigo de niaj venontjaraj festoj.

V. B.



Unu el la naftorezervejoj

„Amikeco–1" kaj „Amikeco–2"

Nafto el Sovetio



Memortabulo pri la konstruado de „Amikeco–2"

La proporcio de karbonhidrogenoj en la strukturo de la energiofontoj daŭre plialtiĝis dum la lasta jardeko en Hungario. La plej grava el tiuj karbonhidrogenoj estas la *nafto*.

Hungario posedas proprajn naftofontojn, tamen ties produkto ne povas kontentigi la bezonojn de la ekonomio. Sekve Hungario devas importi naftonkaj ĉ. 70 procentojn de tiu importbezono kontentigas Sovetio, je prezo malpli alta ol tiu de la OPEC-landoj.

La nafto venas el Sovetio en la tuboj de la kondukil-sistemoj „AMIKECO–1" kaj „AMIKECO–2". Avantaĝo de la tiamaniera transportado evidentiĝas, se oni pripensas, ke ekz. transportado de 10 milionoj da tunoj da nafto bezonus ĉiutage 30 vartrajnojn, konsistantajn el po 24 cisternvagonoj de po 40-tuna kapacito. Krome, kiel grandan laboron necesigus tiu grandega kvanto de nafto en la akcepta loko!

Ne detaligante la ekonomian signifon de la nafto, ni sekvu la historion de la menciitaj kondukilsistemoj, laŭ teknika vidpunkto.

La konstruado de la kondukilsistemo „A–1" komenciĝis la 1-an de julio 1961, surbaze de internacia kontrakto inter Sovetio, Pollando, Germana Demokratia Respubliko, Ĉehoslovakio kaj Hungario. Tiu kontrakto celis utiligi la naftonekspluatitan en la teritorio de Volgo. La konstruintoj de la hungarlanda etapo de la kondukilsistemo „A–1" devis venki malfacilajn naturajn obstaklojn, interalie 31 akvo-, 29 vojo- kaj 13 fervojo-kruciĝojn. La plej granda laboro estis la konstruado en la fluejo de Danubo. La hungarlanda etapo de „A–1" etendiĝis 148 km longe, de la vilaĝo SACHY (disbranĉpunkto en Ĉehoslovakio), ĝis la akcepta kaj rafina uzino funkcianta en SZŐNY, urbeto en okcidenta Hungario.

Lau tradicia elektra procedo kunvelditaj tuboj – produktitaj el 5 mm dikaj ŝtallamenoj, kun diametro de 415 mm – konsistigas la kompletan kondukilsistemon, kiu post tre zorgema izolado kontraŭ korodado, estis lokita en la teron sur la indikita ŝpurlinio.

La ekfunkciigo de la kondukilsistemo „A–1" okazis la 17-an de septembro 1962. La nafto, ennutrita pere de la pumpstacio TUPA (Sovetio), komencis sian vojon laŭlonge en la tubo, kaj la unua guto alvenis al la celo post du tagoj. Oficiala inaŭguro de la kondukilsistemo „A–1" okazis la 13-an de oktobro 1962.

Laŭ la ekonomiaj kalkuloj la transportkostoj de la nafto, liverata pere de la kondukilsistemo „A–1" egalas nur kvinonon de la frajtprezo de fervoja transporto – sekve *la investokostoj estis regajnitaj dum du jaroj.*

Laŭregula kaj konstanta kontrolado fare de faka personaro kaj telemetrika signalilaro prizorgas la sekuran funkciadon de la kondukilsistemo „A–1". Rezulte de tiu precize organizita gardoservo – post la elimino de la komencaj malfacilaĵoj – okazis nenia perturbo dum la pasintaj 16 jaroj. En kazo de eventuala danĝero, la pumpstacio de TUPA aŭtomate haltigas la funkciadon.

Tiu fakto, ke la nafto ricevita tra la kondukilsistemo „A–1" estas la krudmateriala bazo ne nur de la vasta hungara nafto-rafina industrio, sed ankaŭ de pluraj branĉoj de la kemia industrio, estis necese altigi la teknikan nivelon de tiuj industrio-branĉoj.

Meza transportkapacito de la kondukilsistemo „A–1" estas 5 milionoj da tunoj jare.

Pro la rapide kreskantaj bezonoj de la hungaraj industrio, agrikulturo, trafiko kaj loĝantaro, necesis pliigi la nafto-importon el Sovetio. Tiucele – surbaze de nova kontrakto subskribita kun Sovetio en 1969 – la hungara registaro decidis konstruigi novan kondukilsistemon, kiu ricevis la nomon „AMIKECO–2". La konstrulaboroj estis finitaj en 1972, kaj en tiu jaro alvenis la unua naftoliveraĵo en la uzinon de SZÁZHALOMBATTA (urbeto apud Budapeŝto). La kondukilsistemo „A–2" kontaktiĝas rekte al la ĉefa kondukilo en Sovetio, do ĝi ne trairas la teritorion de Ĉehoslovakio. 280 km longa tubo kun diametro de 609 mm kreas la hungarlandan etapon de la kondukilsistemo „A–2". Ĝi estas konstruita surbaze de la teknikaj spertoj, gajnitaj dum la konstruado de la kondukilsistemo „A–1". La transportkapacito de tiu nova kondukilo estas jare 10 milionoj da tunoj. Ĝis nun Hungario ricevis entute 70 milionojn da tunoj da nafto per la kondukilsistemoj „A–1" kaj „A–2".

La nafto, grava faktoro de la civilizita vivo – post la rafinaj procezoj – en diversaj formoj (benzino, gasoleo, hejtoleo, ktp.) estas utiligata en praktike ĉiuj branĉoj de la hungara ekonomio, kaj ankaŭ en la privata vivo de la civitanoj.

Lajos *Kapitány*

„Librofabriko" en Budapeŝto

23 titoloj, sur 4000 paĝoj, en 77 000 ekzemploj

Rememoro pri la revuo *Literatura Mondo* kaj precipe pri ĝia eldonejo vekas eĉ nuntempe „sanktan emocion" en la animo de multaj esperantistoj. Tiu ĉi eĉ „postmorta" respekto estas nepre motivita, ja tiu eldonejo ludis decidan rolon en tio, ke Esperanto nun estas matura lingvo, uzebla en ĉiuj branĉoj de la vivo kaj artoj.

Post la formorto de tiu eldonejo en Hungario aperis Esperantaj libroj nur sporade, tamen tiuj – kiel ekz. *La tragedio de l'homo* (1965), *Ora duopo* (1966) ktp. – ĝenerale rikoltis sukceson en la internacia merkato.

Sed fine de 1976 komenciĝis renesanco, kiu superas eĉ la plej fekundajn jarojn de *Literatura Mondo*. Dum proksimume du jaroj kaj duono Hungara Esperanto-Asocio eldonis en Esperanto 23 titolojn kun amplekso de pli ol 4000 paĝoj. La suma eldonkvanto de tiuj libroj estas 77 000. Ĉar ĉiu Esperanta libro estas kvazaŭ heroldo, argumentanta por la Internacia Lingvo, ni povas diri, ke ni disponigis al la Movado tutan armeon da heroldoj . . . Ne estas seninterese mencii, ke 13 el tiuj 23 libroj estis originale verkitaj en Esperanto.

Ni debutis en decembro de 1976 per la represo de *Koko krias jam!* de F. Szilágyi. En 1977 ĝin sekvis nur du aliaj libroj: *De paĝo al paĝo* kaj *Kvaropo*. La jaro 1978 estis pli fruktodona: eliris ok titoloj, inter ili gravaĵoj, kiel *Kain kaj Abel*, kompletiga novelaro de S. Szathmári, kaj *25 jaroj* (Antologio de Belartaj Kunkursoj).

Kulmino tamen estas la kuranta jaro, dum kiu ĝis nun aperis 12 libroj. La plej granda fortostreĉo certe estis represo de la unua eldono de *Enciklopedio de Esperanto* en du volumoj. Tiu ĉi utilega konsultlibro estas necesa ne nur ĝis la – verŝajne ne tre baldaŭa– apero de la dua eldono, sed ankaŭ poste: neniel la dua eldono povos liveri tiel ampleksajn informojn pri la unua heroa duonjarcento de la Esperanto-movado, kiel tiu ĉi ĉefverko de L. Kökény kaj V. Bleier.

Apartan mencion meritas tri libroj, eldonitaj okaze de la Internacia Jaro de la Infano. Ili estas: *Hund-bazaro* (33 hungaraj porinfanaj poemoj), *Hungaraj Fabeloj* de Elek Benedek, kaj la luksa bildrakonto *La steloj de Eger*. Krom la infanojn, HEA omaĝis en tiu ĉi jaro ankaŭ la hungaran klasikan proziston Zsigmond Móricz per eldono de du liaj libroj: *Malriĉaj homoj*, kaj *Ĉiela birdo*. Lia tria verko, la ampleksa romano *Varmega kamparo* estas presata.

Ŝatantoj de la Esperanta kulturo verŝajne volontege akceptos la tralaboritan duan eldonon de *Gvidlibro por supera ekzameno*, kiu enhavas bazan studmaterialon pri la historio, literaturo kaj instrumetodo de Esperanto. Interesiĝantoj pri la historio de Esperanto povas profundigi sian scion per la eminenta studlibro *Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado*, dum la intimiĝon kun la Esperanta literaturo





grave helpas *Baza Literatura Krestomatio*, kiu enhavas 128 verkojn aŭ fragmentojn de verkoj de 56 esperantistaj aŭtoroj. Ŝatantoj de la originala prozo verŝajne favore akceptos la verkon *Libro de romanoj*, kiu amplekse rerakontas la ses originalajn romanoj de Vallienne kaj Luyken.

Ĝis nun ni parolis nur pri la libroeldonado de HEA. Krom la libroj, eldonitaj de nia landa asocio, fariĝis popularaj ankaŭ la ciujaraj 100-paĝaj kolektoj *Sciencaj komunikaĵoj*, eldonitaj de la Budapeŝta Teritoria Komitato de HEA. La ŝtata eldonejo de lernolibroj kontribuis al la agado per la legolibreto *La kato en la sako.*

Fine sed ne laste estu menciita la grava eldonagado de la Filologia Fakultato de la Universitato „Eötvös Loránd" en Budapeŝto. La ĝisnunaj tri *Esperantologiaj Kajeroj* – fakte dikaj volumoj 200–400-paĝaj – estas ne nur gravaj kontribuaĵoj al la esperantologia literaturo, sed notindas ankaŭ el prestiĝ-vidpunkto.

Siatempe la glora *Literatura Mondo* ĉiam devis plendi pro la indiferenteco de la esperantistoj. Ni ne faras tion, kvankam ni devas konfesi, ke mendoj tute ne venas al ni inunde, malgraŭ tio, ke niaj eldonaĵoj estas aĉetablaj praktike en ĉiuj landoj – kaj socialismaj, kaj kapitalismaj.

En la kompilado de sia eldonplano HEA ĉiam havis antaŭ la okuloj duoblan celon: konigon de la hungara literaturo al la esperantistoj, kaj indan kontribuon al la propre Esperanta kulturo. Per nia ĝisnuna agado ni pruvis, ke ni povas servi tiujn du celojn samtempe.

En la aktuala momento sur nia skribotablo kuŝas almenaŭ kvar manuskriptoj, kies apero estos grava kontribuo al la Esperanta kulturo: originalaj novelaroj de I. Nemere kaj E. Tóth, ampleksa originala romano de B. Wacha, kaj preskaŭ 500-paĝa *Historio de la Esperanta teatro* el la plumo de Á. Abonyi-Nagy. Se vi volas, ke tiuj manuskriptoj fariĝu libroj, helpu nin: niajn libroreklamojn en HV ne konsideru spac-ŝtopiloj, sed varmkora invito por aĉeto!

V. B.

Modela vivo

Vivo dediĉita al Esperanto

D-ro Lajos Győry-Nagy

De kiam la homo havas konscion, ĉiam li strebas spiti la morton. Iuj tion faras per zorgega gardado de sia korpo kontraŭ ĉiuj damaĝoj de la naturo kaj socio. Aliaj ne celas fiziologian senmortecon, ili volas krei per sia laboro ion temprezistan, kio konservos ilian nomon ankaŭ post la fiziologia morto.

Estas stranga, sed justa grimaco de la naturo, ke ofte ĝi donacas longan fiziologian vivon al tiuj, kiuj neniam ŝparis siajn fortojn, sed konstante agadis, kreis, kaj *servis* siajn kunhomojn.

Tia persono estas d-ro Lajos *Győry-Nagy*, kiu plenumis sian 87-an jaron dum tiu ĉi printempo, sed dank' al sia rekta korpoteno, junece viglaj vizaĝo kaj okuloj, facile li povus fornei du jardekojn el sia aĝo.

Li komencis sian esperantistan karieron en la urbo Miskolc: li eklernis Esperanton dum la jaro 1912 kune kun *Kalocsay*. De tiu tempo – dum preskaŭ sep jardekoj – seninterrompe li partoprenis nian movadon: same seninterrompe de 1916 li estas delegito de UEA!

Li fariĝis advokato, kaj dum la Konsilia Respubliko en la jaro 1919 li laboris en la Prokurorejo de la Revolucia Tribunalo de Miskolc. Li ofte utiligis Esperanton ankaŭ kiel advokato: li akiris per la Internacia Lingvo eksterlandajn dokumentojn, plenumis juran reprezentadon de eksterlandaj esperantistoj antaŭ hungaraj tribunaloj, ktp.

Kiam antaŭ 19 jaroj fondiĝis HEA, li tuj eklaboris en la organizita movado, kaj depost la jaro 1961 ĝis nun li estas prezidanto de la Departementa Esperanto-Komitato en Miskolc. Sed lia socia laboro ne limiĝis nur je Esperanto. Li plenumis signifajn postenojn en la pacmovado kaj la Hungara-Soveta Societo de Amikeco. Dank' al tiuj cirkonstancoj, li estas konata persono en Miskolc, kaj tiu fakto multe helpas lin en lia poresperanta agado.

Ni, hungaraj esperantistoj – kiel certe ankaŭ liaj multaj amikoj en aliaj landoj – fiere salutas d-ron Lajos Győry-Nagy, kiu malgraŭ sia alta aĝo ne nutras sin per rememoroj: li daŭre agas, laboras por la estonto de ni ĉiuj.

V. B.

Nikola Aleksiev, unu el la plej elstaraj figuroj de Bulgara kaj monda Esperanto-movado, la 29-an de junio fariĝis 70 jara.

Li apartenas al la plej aktiva kaj energia taĉmento de la Internacia Esperanto-movado, kiu senrezerve dediĉas siajn fortojn por la progreso de la Internacia Lingvo.

Aktiva batalanto por paco, li senlace agadis por la evoluo de MEM kaj de 1963–1978 li estis prezidanto de tiu ĉi aŭtoritata Esperanto-organizo.

Nikola Aleksiev frue ligis sian vivon kun la bataloj de Bulgara Komunista Partio, kaj elkreskis kiel talenta organizanto de la revolucia bulgara sindikata movado. Aktiva ĵurnalisto, li redaktis la sindikatan semajnrevuon „Edinstvo" (Unueco), li fondis kaj estis ĉefredaktoro de la revuo „Zname na truda" (Standardo de laboro) kaj de 1946–1952 li estis ĉefredaktoro de la organo de bulgaraj sindikatoj „Trud" (Laboro).

Aleksiev ekkonis la Internacian Lingvon kiel lernanto kaj frue komprenis ke Esperanto kunligas la laboristojn de la tuta mondo en ilia nobla batalo. Nikola Aleksiev estis unu el la fondintoj de la Bulgara Laborista Esperanto-Asocio kaj gvidis ĝin de 1929 ĝis 1934, kiam la reakcia reĝimo malpermesis ĝin.



Nikola Aleksiev

Post la liberiĝo Nikola Aleksiev apartenas al la plej aktivaj esperantistoj de Bulgara Esperanto-Asocio kaj de 1964 ĝis 1976 li estis ĝia prezidanto.

Vasta kaj riĉa estas la socia agado de Aleksiev. Li aktivas en la prezidio de la Bulgara Packonsilantaro, en la prezidio de la Patrolanda Fronto, estas membro de la nacia Konsilantaro por Sobreco. En 1958 li fariĝis kandidatmembro de la Centra Komitato de la Bulgara Komunista Partio. De 1961 ĝis 1964 li estis vicprezidanto de la Komitato por Amikeco kaj Kulturaj rilatoj kun eksterlando.

El lia ĵurnalista plumo aperis multaj artikoloj pri Esperanto kaj Esperanto-movado.

En Bulgario mi havis eblecon ofte renkontiĝi kaj paroli kun li. Lia modesta, natura konduto, lia trankvila rigardo vekis respekton, kaj mi demandis min mem, kiamaniere kamarado Nikola Aleksiev trovas tempon por tiu ĉi vasta kaj multfaceta agado, kiu estas viva ekzemplo por la junaj Esperanto-aktivuloj.

Okaze de la 70-jara jubileo de kamarado Nikola Aleksiev hungaraj esperantistoj kaj la redakcio de „Hungara Vivo" decidis saluti lin per la intima plumo de samnaciano: por la subskribinto tiu ĉi tasko estis plezuro kaj honoro samtempe.

Georgi *Mihalkov*

Mia revo

PENSOJ DE BULGARO PRI LA HUNGARA LITERATURO

Mia revo naskiĝis delonge, kiam mi estis ankoraŭ lernanto. Ĝi naskiĝis el forta emocia impreso post la unua tralego de Petőfi-poemoj, tradukitaj esperantlingven de K. Kalocsay. La klaraj pensoj kaj arda emocio de tiu poeto, kies kreado idee kaj teme similas al la kreado de la bulgara poeto Hristo Botev, ravis min. Liaj poemoj malfermis miajn okulojn al la vasta hungara ebenaĵo, al la heroa historio de la hungara nacio, kaj mi eksentis ardan deziron penetri en la literaturan trezorejon de tiu malgranda popolo.

Esperanto donis al mi multe, sed sufiĉas jam tio, ke per ĝi mi povis renkontiĝi kun la riĉa hungara literaturo. Ankaŭ nun unu el miaj plej karaj libroj estas la malgranda volumo de Petőfi-versaĵoj *Libero kaj amo*, tradukita en Esperanton de K. Kalocsay. Mi ofte trafoliumas ĝin, kaj ĉiam mi malkovras novajn pensojn, novajn ideojn, kiujn mi ne eksentis antaŭe. Ravas min la fakto, ke per la simplaj formoj de la popolaj kantoj tiu flamanta bardo de la hungara revolucio proklamis la plej noblajn kaj progresivajn ideojn de sia epoko.

Vere mi ne konas alian poeton, kiu pli klare kaj pli spontane en belega poezia formo esprimis la plej intimajn sentojn de sia nobla koro.

Se Petőfi ravis min per sia pura voĉo kaj la flamo de sia juneco, Imre Madách kaj lia *La tragedio de l' homo* turnis mian rigardon al la filozofiaj problemoj de la vivo.

Ankaŭ tiun verkon mi renkontis en la traduko de Kalocsay. *La tragedio de l' homo* montris al mi la tutan homan historion kun ĝiaj vanaj ekflamiĝoj kaj seniluziiĝoj. En la monda literaturo ne abundas aŭtoroj, kiuj kun tiel akra sarkasmo priskribas la realon de sia epoko. Mi nur bedaŭras, ke la vasta monda legantaro ne konas la grandiozan verkon de Madách, ĉar tiu libro meritas saman atenton, kiel *Faŭsto* de Goethe. Kaj mi devas diri, ke sen la scio de Esperanto eble neniam dum mia vivo mi legus la draman poemon de Madách.

Post Madách mi provis enpenetri la literaturan mondon de Kálmán Mikszáth. Kiom da agrablaj minutoj donis al mi la legado de lia verko *Fantomo en Lubló*, tradukita esperantlingven de E. Forster!

Mi legis libron post libro, kaj malrapide, nerimarkeble mi intimiĝis pli kaj pli kun la hungara literaturo. Antaŭ miaj okuloj pasis bildoj kaj pejzaĝoj el la belega hungara naturo, pasis historiaj eventoj, talentaj aŭtoroj kaj interesaj herooj. Iom post iom mi komencis kompreni la profundan hungaran animon. Kvazaŭ mi eksentis la orientan flamon kaj okcidentan delikatecon, kies kunfandiĝo kreis tiun animon.

Ĉu mi povas iam forgesi Boka, Nemecsek, Kolnay, Barabás, ruĝ-ĉemizan Franĉjon Ács, kiaj ilian kreinton Ferenc Molnár? Ĉu mi povas forgesi *La knabojn de Paŭlo-strato?*

Se Petőfi montris al mi la senlimon de la vasta hungara ebenaĵo; F. Molnár malkovris por miaj okuloj la urban vivon, kaj la heroojn de la urba socio: proleton, burĝon, infanojn, histerian virinon, nervozan advokaton . . . Mi eksentis la doloron kaj vundon en la animprofundoj de ciuj el ili. Ravis min la kara, bona koro de Boka, tiu neforgesebla, serioza knabo, „generalo" de la Paŭlo-strata grundo. Ravis min la talento de Molnár, kiu kun granda amo, iomete nostalgie kaj malgaje priskribas la sunajn, ĉarmajn tagojn de la infanaj jaroj.

En mia legado ne ekzistis sistemo. Mi legis ĉiujn hungarajn librojn, kiujn mi trovis en Esperanta traduko, kaj tiel post F. Molnár mi konatiĝis kun Endre Ady. Jam per kelkaj versaĵoj de Ady mi tiuj eksentis, ke mi eniras en la poezian mondon de granda poeto. La enhavo kaj formo de liaj poemoj estas ĉiam en perfekta unueco. Li heredis ĉiujn belaĵojn en la kreado de Petőfi, pliriĉigis ĝin per sia sentema animo kaj delikata emocio, kaj donis al sia popolo mirindajn poemojn. Ady tuj fariĝis tre proksima al mi, ĉar liaj poemoj kaj lia vivo forte similas al la poemoj kaj vivo de la fama bulgara poeto Pejo Javorov. Simile al Ady ankaŭ Javorov respegulis en siaj poemoj la maltrankvilan ribeleman mondon de la jarcent-komenco. En la poemoj de Endre Ady mi vidis ĉiujn animkonfliktojn de la moderna homo de tiu tempo. En la personeco de Ady mi vidis honestan homon – poeton kaj civitanon, profunde emociigitan de la grandaj problemoj de la epoko.

Por ekkono de la hungara literaturo tre helpis al mi la revuo *Hungara Vivo*. Sur la paĝoj de tiu ampleksa kultura-literatura revuo mi trovis multajn belegajn poemojn kaj novelojn de nuntempaj hungarajn verkistoj. Jen, listo tute nekompleta: Tamás Bárány, István Csurka, Endre Fejes, László Gyurkó, Magda Szabó, Sándor Csoóri, László Nagy, Gyula Illyés, Sándor Weöres k.a.

Longe mi memoras la belan kaj interesan rakonton de István Csurka, *La maljuna statisto*, tradukita esperantlinven de Marianna Khek-Rieth. Per granda verkista majstreco kaj talento Csurka penetras en la animon de tiu modesta ordinara homo, pri kies ekzisto fakte ni eĉ ne konjektas.

Csurka spertas krei fortajn originalajn karaterojn. Ame kaj amike li observas siajn heroojn; li sentas iliajn ĝojojn kaj dolorojn, kaj reale li priskribas tiujn.

En la verkoj de Gyula Illyés mi eksentis ne nur la pulsadon de la nuntempa multflanka vivo, sed ankaŭ tiun originalon, specifan atmosferon, kiun ĉiu hungaro portas profunde en sia animo, kaj kunligas lin kun praaj hungaraj fontoj. Liajn belajn poemojn mi legis en majstraj tradukoj, faritaj de Kalocsay kaj Tárkony.

La literatura rolo de László Nagy havas gravecon por bulgaroj, ĉar li tradukis en la hungaran lingvon multajn poemojn de la plej talentaj bulgaraj poetoj, sed mi tre ĝoje legis ankaŭ liajn proprajn verkojn – en Esperanta traduko.

Preskaŭ en ĉiu numero de Hungara Vivo mi legas novajn poemojn kaj novelojn de diversaj hungaraj aŭtoroj. Tre malfacile mi povus diri, kiu hungara poeto aŭ verkisto plej forte ravis min per sia kreado? La vero estas tio, ke en ĉiuj mi trovas ion interesan, originalan kaj novan. En multaj poemoj kaj noveloj mi vidas klaran difinon de multaj problemoj, kiuj zorgigas ankaŭ min, sed plej grave estas ke per la Internacia Lingvo mi malkovris la hungaran literaturon kiel tuton. Mi raviĝis per ĝia riĉeco de herooj, konfliktoj, ideoj, tonoj, koloroj kaj melodioj.

Eble mi ne povis detale trastudi la hungaran literaturon, ĉiujn literaturajn periodojn kaj ĉiujn ties talentajn reprezentantojn, sed mia revo realiĝas. Paĝo post paĝo, libro post libro mi penetras en la hungaran literaturon, kiu certe ankoraŭ regalos min per multaj ravaĵoj.

Georgi *Mihalkov*



Péter András Rados

Spertoj agrablaj kaj utilaj

Intervjuo kun P A.Rados

Hungara Esperanto-Asocio lastatempe energie ekaktivis en la kultura kampo. Ĝia vigla libroeldonado estas jam mondfama, sed okazis ankaŭ aliaj eventoj. Ekzemple fine de 1977 Vilmos Benczik, ĉefredaktoro de HV faris prelegvojaĝojn en pluraj socialismaj landoj, prelegante pri la centjara hungara klasikulo, Endre Ady. Ĉi-jare okazis similaj prelegvojaĝoj pri Hungarlanda Konsilia Respubliko kaj estis organizita pola-hungara Esperantlingva deklamkonkurso.

Unu el la ĉefaj figuroj de tiu ĉi agado estas Péter András Rados (Radoŝ), kiun legantoj de la Hungara Vivo konas kiel tradukinton de versaj kaj prozaj literaturaĵoj, krome kiel verkinton de kelkaj recenzoj kaj artikoloj. Sed lastatempe li ekhavis ankaŭ aliajn rolojn.

HV. Ekde la fino de 1978 vi multe veturadas. Pro kio kaj por kio?

– Pro tio, ke oni min veturigas por diversaj celoj. La unuajn tagojn de decembro 1978 ekzemple mi kiel reprezentanto de HEA partoprenis en Zakopane la tutlandan konferencon de Pola Esperanto-Asocio kaj tie mi havis la eblon por priparoli kelkajn komunajn aranĝaĵojn kun gvidantoj de PEA, ekzemple mian prelegvojaĝon kaj la Esperantlingvan deklamkonkurson.

HV: Kiel ili sukcesis?

– La prelegoj okazis en februaro en Gliwice, Opole, Lodzo kaj Varsovio. Kelkaj ne estis kontentaj pri ili, laŭ mi pro la ioma nekutimeco.

HV: Kion signifas tiu ĉi lasta vorto?

– Mi ne volis aranĝi tradician prelegon kun lumbildoj pri la Hungarlanda Konsilia Respubliko. Anstataŭe mi kun iom pena laboro faris muntaĵon de dokument-citaĵoj, literaturaĵoj kaj kelkaj klarigoj. Estiĝis iaspeca dokumentludo, kiun prezentis du gedeklamantoj (F-ino Ágnes Kisházi kaj mi), dum sur la ekrano laŭvice aperadis la adekvataj lumbildoj (ilin prezentis D-ro Ferenc Gallwitz).

HV: Kion vi celis pere de tio?

– Mi volis altiri la spektantojn en la etoson de tiu epoko, iom konfuza, iom krude verdira, sed laŭ mi entuziasmiga kaj tre bela . . .

HV: Kaj?

– La ĉefoj estis diversaj: eble ne ĉiuj spektintoj havis la samajn nostalgiojn al tiu epoko, kiel mi.

HV: Kio okazis poste?

– Tiu prelegvojaĝo estis planita ne nur al Pollando. Por la aliaj landoj iom mi mallongigis la tekstojn el dokumentoj, aldonis kelkajn novajn beletraĵojn.

HV: La spertoj?

– Sufiĉe bonaj. En majo mi estis en Ĉeĥoslovakio kun la tralaborita materialo. Tie en Prago, en Cheb, en České Budějovice, en Svitavy kaj en Ostrava la sukceso estis multe pli bona. Tion mi dankas ankaŭ al miaj tieaj kunlaborintoj: F-ino Márta Kovács kaj S-ro Tibor Somogyi.

HV: La sekvaj eventoj?

– La programo – iom denove tralaborita – estis prezentita de s-ro Márton Fejes, s-ino Éva Farkas-Tatár kaj s-ro Dénes Fiatal en Bulgario, poste mi kun nova trupo prezentis ĝin en GDR.

HV: Pri tio eble sufiĉas. Bonvolu rakonti iom pri la pola-hungara deklamkonkurso!

– Pri ĝi jam en la pasinta jaro naskiĝis interkonsento de HEA kaj PEA. Estis elektitaj po dek ampoemoj el ambaŭ literaturoj en Esperanta traduko. En Hungario kaj en Pollando samtempe estis organizitaj landaj konkursoj, kies kvar plej elstaraj partoprenintoj havis la rajton ĉeesti la finalon en Gdansko, kie ili ĉiuj prezentis po unu polan kaj po unu hungaran ampoemon.

HV: Vi tie prezidis la ĵurion. Rakontu iom pri la finalo!

– Ĝi okazis la 27-an de majo en la Malnova Urbodomo de Gdansko, konstruita en la 17-a jc., do en vere historia ĉirkaŭaĵo. La ok gedeklamintoj estis vere elstaraj, do la ĵurio, en kiu partoprenis krom mi ges-roj Jadwiga Gibczynska kaj Zbigniew Dobrzinski el Pollando, kaj s-ro Karlo Fajszi el Hungario, havis iom malfacilan laboron.

HV: Bonvolu iom pri la rezultoj!

– La unuan premion gajnis f-ino Elizabeta Leonowicz (Pollando), kiu vere surprizis min per perfekta transdonado de la etoso de *La Kvarbova Veturilo* de Petőfi, la dua estis s-ro Stefan Kozlowski (Pollando), la trian lokon ricevis Katalin Petrán (Hungario). Mi aparte mencius ankaŭ unu alian partopreninton, nome s-ron József Erős, kiu ankaŭ laŭ la publiko estis unu el la plej impresaj deklamintoj. Cetere, en la tutlanda hungarlingva deklamkonkurso de la Hungaraj Radio kaj Televido li iĝis la dua laŭ la ĵurio, kaj la unua laŭ la publiko.

HV: Viaj konkludoj?

– Mi havis multajn spertojn vere agrablajn kaj utilajn, kaj opinias, ke oni devas daŭrigi la tiuspecajn agadojn en niaj najbaraj landoj por pli bone ekkoni unu la aliajn, utiligante la eblojn de Esperanto kaj tiujn de la Movado. Al similaj iniciatoj povus eble aliĝi ankaŭ aliaj najbaroj.

HV: Koran dankon al vi pro la intervjuo.

Attila József

Kiam karulin' surstrate trairis

Kiam karulin' surstrate trairis,
la kolomboj sin al paseroj tiris.

Ĉe surpaŝo al ŝtono trotuara
ekbrilis ŝia maleolo kara.

Kiam ŝian ŝultron skuiĝo trafis,
knabeton tio porlonge priravis.

Ŝvebanta paŝo – lum' elektra ekis,
oni kun ĝuo sin gajaj miregis.

Kaj al ŝi ridis oni sen envio,
ke ŝi ligiĝas jam al mia mio.

Kiun mi lulis, karesis en sino,
eble iu prenos – kaptis min timo!

Sed sur min humor' ilia trairis,
floron de l' envio el koro forŝiris.

Kaj iris plu la karulin' serena,
sekvis ŝin vent' gracia, friskoplena.

Tr.: Márton *Fejes*

*Unu el la eroj de la pola-hungara deklamkonkurso.

ĉapitroj el la historio

Zoltán Halász

11. Hungario kaj la absolutismo

1.Maria Teresa (1740–1780)

La packontrakto ĉe Szatmár (1711), per kiu finiĝis la liberbatalo de Rákóczi, estis kompromiso inter la registaro Habsburga kaj la hungaraj nobelaj ordenoj. Pluvivis la sistemo de l'departementa nobelaro kaj la leĝdona rajto de l'asembleo de nobelaj ordenoj. La nobeloj ĵurintaj fidelecon, povis konservi siajn bienegojn kaj privilegiojn. Reciproke, la hungara reganta klaso rekonis la porĉiaman regadon de l'Habsburga dinastio, kaj poste, en 1723, ili aprobis la leĝon nomatan „Pragmatica Sanctio", kiu ankaŭ al la ina branĉo de la dinastio etendis la hered-rajton de la trono, proklamante samtempe la nedispartigeblon de la Habsburga imperio.

La paco ebligis laŭgradan restarigon de la sangoperdinta kaj ruiniĝinta lando, post unu kaj duonjarcenta regado de turkoj kaj la konstantaj bataladoj. Komence de la 18-a jarcento, la loĝantaro de Hungario estis maksimume 3,5 – 4 milionoj – proksimume la sama kiel antaŭ tricent jaroj. Por impulsi la ekonomian vivon, unuavice estis bezonataj laborfortoj. Oni permesis la migradon de servutuloj interne de la lando: sekve, el la nordaj regionoj, kiuj ne suferis pro la turka okupado, grandaj amasoj da hungaroj kaj slovakoj translokiĝis en la sudajn, senhomajn regionojn. De suda direkto alvenis slavoj, kaj de diversaj direktoj, germanoj. Sekve de tiu amasa enmigrado, dum sepdek jaroj la loĝantaro de la lando duobliĝis, superante jam la ok milionojn. La proporcio de hungaroj ene de tiu loĝantaro estis pli malalta ol tiu de ĉiuj naciaj minoritatoj kune.

Rilate la ekonomion, la plej grandan evoluon montris la agrikulturo, spite la gravajn malfacilaĵojn. Nome la grandbienuloj, pliigintaj la ekspluatadon de l'bienoj, reduktis la servutulajn parcelojn kaj pliigis la ŝarĝojn pezantajn sur ili. Malgraŭ la rigida opozicio de la grandbienuloj, Maria Teresa (1740–1780) reglamentis la servutulajn ŝargojn pere de dekreto konata sub la nomo „Urbarium". Tiel la ŝarĝoj de l'servutuloj konsiderinde malpliiĝis. La Habsburga registaro klopodis, ke Hungario fariĝu provizejo de nutraĵoj kaj krudmaterialoj por la aŭstraj kaj ĉeĥaj teritorioj, kaj samtempe ĝi estu la konsumanta merkato de industriaj produktoj devenantaj de la menciitaj landpartoj. La enkondukita dogana sistemo akcentis la kolonian staton de Hungario.

.Moneroj de reĝino Maria Teresa

Komisiito de la servutuloj transdonas la tributon al la feŭda sinjoro (samepoka desegnaĵo)

Dekreto de Maria Teresa an 1777, kiu reglamentas la publikan edukadon

de la hungara popolo

de Habsburgoj

Montriĝis vera progreso rilate la dekretojn pri instrua sistemo kaj publika higieno. La plilarĝigita Medicina Fakultato estis translokigita de urbo Nagyszombat* en la ĉefurbon Buda.

La filo kaj posteulo de Maria Teresa, Jozefo la 2-a (1780–1790) celis realigi profundajn reformojn en spirito de l'klera absolutismo. Ĉar tio renkontis la kontraŭstaron de la nobelaj ordenoj, li ne kronigis sin, por ke li ne bezonu ĵuri fidelecon al la konstitucio de l'ordenoj. Liaj unuaj reformoj celis eltiri la katolikan eklezion el sub la senkondiĉa regado de Romo. Li malfondis la plimulton de la monaĥaj ordenoj, kaj iliajn bienegojn transdonis por celoj de l'publika instruado; li garantiis la liberan religian kulton de protestantoj kaj grekaj skismuloj; kaj al la junaj servutuloj la eblon studi kaj elekti profesion; krome, li malpermesis, ke la grandbienuloj forpelu siajn servutulojn. Lia dekreto pri lingvo kaŭzis grandan konsternon, ĉar la reĝo ordonis, ke en la tuta Habsburga imperio la germana estu la oficiala lingvo, anstataŭ la ĝis tiam uzata latino. La ĉi-kampa rezisto donis pozitivajn rezultojn, ĉar kultivi la hungaran lingvon fariĝis politika programo, samtempe tio impulsis la evoluadon de la hungarlingva literaturo.

La sigelo de la Filozofia Fakultato de la Universitato de Nagyszombat, translokigita al Buda

La granda eksperimento de Jozefo la 2-a, per kiu li volis direkti sur nova vojo sian imperion, finfine ne sukcesis. Sur la mortlito la reĝo neniigis ĉiujn reformojn, krom la dekretoj pri religia toleremo kaj pri servutuloj.

Leopoldo la 2-a (1790–1792), kiu post lia morto heredis la tronon, reduktis ĝis nulo la movadon por la nacia sendependeco, eluzante por siaj celoj la internajn kontraŭdirojn en Hungario. Lia posteulo, Francisko la 1-a apogis sin al la konservemaj fortoj de l'feŭdismo, ĉar li konsideris kiel sia ĉefmisio „bridi la demonon de l'revolucio". Kvankam la ideologio de la plimulto de l'hungara reganta klaso estis konservema, kaj la ideoj de la franca revolucio apenaŭ atingis la popolajn amasojn, inter la intelektuloj kaj etnobeloj estis ankaŭ tiaj, kiuj ege atentis la eventojn en Francio; ili celis la burĝan transformiĝon de la socio kaj la nacian sendependecon. La gvidanto de ĉi tiu socia tavolo estis József Hajnóczy; inter ili ni trovas la poeton János Batsányi, la verkiston Ferenc Kazinczy kaj la ekonomiiston Gergely Berzeviczy . La eventoj de la franca revolucio pliigis la radikalismon de ĉi tiu movado. Kiam en 1794 la eksmonaĥo Ignác Martinovics alprenis ĝian gvidadon, la movado aliformiĝis en jakobenan revolucieman organizaĵon. Post kelkaj monatoj la jakobena movado estis malkovrita kaj la policistoj de l'imperio arestis la estraron. En 1795 Martinovics, Hajnóczy kaj aliaj kvin personoj estis ekzekutitaj post proceso farita malantaŭ fermitaj pordoj. Kelkaj aliaj jakobenoj estis kondamnitaj je longdaŭra prizono.


CONSTITUTA
REGIA,
REGNANTE AUGUST. IMPERATORE ET REGE APOSTÓL.
JOSEPHO II.
PRO REGNO HUNGARIAE EIDEMQUE ADNEXIS REGNIS
ET PROVINCIIS, NEC NON M. PRINCIPATU TRANSILVANIAE
POLITICORUM
PARS I.
TOMUS I.
VIENNAE.

Kolektitaj dekretoj de Jozefo la 2-a, eldonitaj en 1788

Tr.: *VHZS*

La papo Pius la 6-a vizitas en Vieno Jozefon la 2-an por inklinigi lin moderigi sian eklezian politikon



La reĝo Jozefo la 2-a prenas plugilon en la kampo, por simbole plifaciligi la sorton de la servutuloj

* Nun Trnava en Cehoslovakio

Jarcentoj de la hungara literaturo

István Torda

3. BAROKA LITERATURO EN HUNGARIO

Péter Pázmány (1570–1637)

La baroka kulturo en Hungario fariĝis ĝenerala meze de la 17-a jc., unue inter la aristokrataro, sed baldaŭ ankaŭ ĉe aliaj klasoj de la socio. Ĝia florepoko daŭris ĝis la lasta triono de la 18-a jc., kiam ĝian ideologion anstataŭis tiu de la klerismo, ĝian stilon la klasikismo. Disvastigantoj de la baroka kulturo Hungarlande, same kiel en la tuta Eŭropo, estis la jezuitoj, kaj la baroka literaturo tial forte ligiĝis al la kontraŭreformacio.

Predikanto kaj polemikisto

La disvolviĝo de la kontraŭreformacio en Hungario estas ligita al la nomo de *Péter Pázmány* [Pazmanj] (1570–1637), kiu estas samtempe vera iniciatinto de la baroka literaturo hungara. Li naskiĝis en protestanta familio, sed konvertiginte al katolikismo, li fariĝis jeuzito. Li studis en diversaj eksterlandaj monaĥejoj, pasigis iom longan tempon ankaŭ en Romo. Li profesoris en la jezuita universitato de la Aŭstria urbo Graz, poste ekde la jaro 1615 li igis cefepiskopo de Esztergom, kaj kiel tiu, gvidanto de la Hungarlanda katolika eklezio. Tiutempe tiu alta eklezia rango estis samtempe unu el la plej altaj ŝtataj rangoj. Péter Pázmány tiun rolon utiligis por kontraŭstari strebadojn pri la hungara sendependeco kaj por subteni la potencon de Habsburgoj. Li tradukis hungaren la faman libron de Tomaso Kempis *De Imitatione Christi*, verkis preĝaron kaj eldonis siajn kolektitajn predikojn. Lia plej grava verko estas la *Gvidanto al la Dia Vero* (1613), en kiu li volis doni ĝeneralan kaj sisteman refuton de instruoj deviantaj disde tiuj de la katolikismo.

Pázmány estas malatingebla artisto de la kompozicio kaj tiu de la stilo. Komplika, monumenta konstruo de liaj verkoj, liaj grandegaj, sed purlogikaj periodoj ne malhelpis lin esti klara, kompreneblo por ĉiu leganto. Li estis polemikisto kun vere tiamataj kapabloj. Tion plej bone pruvas liaj polemikoj kontraŭ famega predikisto de Kassa (nuntempe Košice, Ĉeĥoslovakio), Péter Alvinczi. Liajn polemikojn karakterizas argumentado, bone utiliganta la malperfektaĵojn de la kontraŭuloj kaj vigla stilo, lerte uzanta „bongustajn" parolturnojn de la parolata lingvo hungara. En liaj verkoj brilas humuro, eĉ kelkfoje bunteco de la stilparodio.

Poeto kaj armeestro

Laŭ la influo de Pázmány kaj liaj kunlaborantoj, la aristokrataj familioj de tiu epoko unu post la alia katolikiĝis. Ili sendis siajn filojn al la universitatoj de Nagyszombat (nuntempe Trnava, Ĉeĥoslovakio), de Graz kaj Vieno, kelkaj el tiuj junaj aristokratoj eĉ studvojaĝis al Italio. Inter tiuj junuloj estis ankaŭ la plej granda hungara poeto de la epoko *Miklós Zrínyi* [Zrinji] (1620–1664). Li estis la unua inter tiuj profeto-poetoj, kiuj dum pluraj jarcentoj ludis decidan rolon en la hungara literaturo. Zrínyi estis politikisto kaj armeestro, fanatikulo de la tutlandaj aferoj – dum eblis ankaŭ saĝa taktikisto – ne nur en siaj agoj, sed ankaŭ kiel verkisto. Liaj verkoj tial estas tiom varmegaj, monumentaj, plenaj je metafora signifo.

Miklós Zrínyi estis ido de kroat-hungara aristokrata familio, fama pri sia kontraŭturka batalado. Li frue perdis siajn gepatrojn kaj estis edukita de jezuitoj. La edukadon inspektis la imperiestro Ferdinando la 2-a kaj Péter Pázmány mem. Zrínyi ekde la 18-jara aĝo loĝis en sia bieno, situanta ĉe la limo

de la Osmana Imperio. Li estis en konstanta batalado kontraŭ la malamiko. La poeto verkis sian ĉefan verkon vintre de 1645–1646: la eposon *Sieĝo de Sziget*. En la verko li prikantis la heroecon de sia praavo, kiu ĝis la lasta soldato defendis la fortikaĵon Szigetvár en 1566. Tiun ĉi historion la publika opinio tiutempa konsideris turnopunkto de turkaj-hungaraj interbataloj.

La verko estas parabolo por la nacio. En ĝi tamen rolas ne abstraktaj simboloj de la heroeco, sed vivantaj sentemaj, amikiĝantaj, amantaj kaj malamantaj homoj, batalantaj foje-foje eĉ kontraŭ la propraj pasioj. Pere de estimo al la malamiko kreskas ankaŭ grandiozo de la hungaraj militistoj, pere de malperfektecoj de la hungaroj pliiĝas la aŭtentikeco de la tuta bildo. Estas montrata sieĝo de limfortikaĵo, hungara fortikaĵestro suferas heroan morton kune kun siaj soldatoj. La malgranda evento, la morto de la heroo, simbolanta la veran hungarecon, iĝas mistika ofero, lia sindonemo altiĝas je diservo. La unufoja faro de heroo ricevas ĝeneralan signifon. La eposo estis inspirita de la kontraŭreformacia spirito. Sed tra la figuroj de la herooj, batalantaj perglave por la Regno de l'Dio glimas specifa hungara mondpercepto. Finan solvon de ĉio formas la politika koncepto, laŭ kiu en la konduto, en la idealoj de la herooj, oferantaj sin pro pekoj de la hungararo, formigas songbildo pri nova, pli bona, pli homa socio hungara.

La eposo propagandis ideon pri forpelo de la turkaj okupantoj kaj tiun pri unuigo

de la lando, disfalinta en tri partojn. Zrínyi por tiuj celoj agadis dumvive, pli kaj pli kontraŭstarante la Habsburgan survenon. Kiel unu el la gvidaj politikistoj kaj armeestroj de la lando, li batalis por nacia monarkio absoluta. La saman celon servis ankaŭ liaj prozaj verkoj latin- kaj hungarlingvaj. En la meza mezo de lia agado, vanigante liajn grandiozajn planojn, venis por li la tragika morto: dum ĉasado li iĝis viktimo de furiozanta virapro.

Herooj de la klerigado

Ankaŭ en la baroka epoko ne ĉesis la burĝeskaj kultura kaj literatura evoluoj, ligitaj al protestantismo. La plej elstara reprezentanto de tiu ĉi movado estis *János Apáczai Csere* [Apacai Ĉere] (1625–1659), en kies verkado kvazaŭ unuiĝis ĉiu tiutempe moderna tendenco spirita: la enciklopediismo, la puritanismaj ideoj kaj la raciisma filozofio de kartezianismo (Descartes-ismo).

Li studis en universitatoj Nederlandaj, kaj la junan scienciston, akirintan aŭtoritatecon ankaŭ en Utrecht, la episkopo de la Transilvania kalvinana eklezio revokis hejmen. En la urbo Gyulafehérvár (nun Alba Julia, Rumanio) li fariĝis profesoro de la tiea altlernejo. Li baldaŭ prezentis siajn reformprojektojn, kiuj renkontis kontraŭstaron flanke de liaj kolegoj. La gvidanto de la profesoraro, iama kortega pastoro de la ekzekutita angla reĝo Karlo la 2-a, Isaac Basire, malameganta la puritanojn, sukcesis malfavorigi al Apáczai regnestran princon de Transilvanio, Georgon Rákóczi la 2-an. Jam en la sama jaro post altrudita polemiko de Apáczai kaj Basire, kie la unua brave defendis ideojn de la puritanismo, la princo eksigis la hungaran profesoron de lia posteno, grave minacante lin. Protektantoj de Apáczai atingis, ke li iĝu lernejestro en Kolozsvár (nuntempe Cluj-Napoca, Rumanio), kie li multe faris por plialtigi la eduknivelon de la lernejo. Tie Apáczai laboris ĝis sia morto. Li aĝis tiam 34 jarojn. La ĉefa verko de Apáczai estas la *Hungara Enciklopedio,* aperinta en 1655. Ĝi la unuan fojon sumis ĉiujn sciencojn en la hungara lingvo.

Similan sorton havis ankaŭ *Miklós Tótfalusi Kis* [Totfaluŝi Kiŝ] (1650–1702), mondfama presisto. Sian metion li lernis en Nederlando ĉe la plej elstaraj presistoj. Li pleje famiĝis pri sia artisma litergravurado. Li gravuris literojn eĉ por la unuaj presitaj libroj kartvellingvaj. Tótfalusi en 1689 revenis al Transilvanio por ĉi tie organizi presejon. Lia metiejo en Kolozsvár estis eminenta presejo de tiuj tempoj. Lia celo estis produkti al la lando grandegan kvanton da malmultekostaj libroj. Liaj strebadoj estis akceptitaj kun malkonfido flanke de la kalvina eklezio, kiu vidis en li danĝeran noviganton. La ofendita presisto verkis kontraŭ siaj malamikoj latinlingvan *Apologion,* kiun poste li mem tradukis hungaren. Pro tio li estis ekprocesita, kaj en 1698 li devis publike pardonpeti de la ofenditoj kaj devis retiri siajn asertojn. Tio estis mortbato por Tótfalusi, kiu pro la ekscitoj ekmalsanis, kaj la lastajn jarojn de sia vivo li pasigis duone paralizita.



Kelemen Mikes

Rákóczi kaj Mikes

Nur malpli grandan parton de la poezio de la 17-a jc. formis la verkoj de nobelaj poetoj. Apud ili agadis granda grupo de kantverkistoj. Ili estis predikistoj, instruistoj, militistoj. Tiu ĉi verkado, situanta inter arta kaj folklora poezioj estis strikte ligita al la naciaj liberbataloj kontraŭ-turkaj kaj kontraŭ-Habsburgaj. Ĝi estis praktikata ĝis la unua kvarono de la 18-a jc. Inter tiuj kantoj multaj okupiĝis pri la personeco de la gvidanto de la liberbatalo ekde 1703 gis 1711, *Ferenc Rákóczi la 2-a* [Rakoci] (1676–1735).

La verkoj de Rákóczi estas same altaj valoraĵoj de la hungara literaturo. Post la falo de la liberbatalo en la elmigrinteco li verkis du memuarojn, latinan kaj francan: *Confesiones* (Konfesoj) kaj *Mémoires* (Rememoroj) en kiuj li montris sin vera majstro de la psikoanalizo kaj tiu de la intereskapta rakontado.

Kelemen Mikes [Mikeŝ] (1690–1761), paĝio de Rákóczi, sekvis sian „Magnissimus Princeps" al eksterlando. Lia ĉefa verko, la Turkiaj Leteroj estas fikciaj sendaĵoj al elpensita onklino. Ili fakte estas leterarforma memuaro pri la vivo de la hungaraj elmigrintoj en Turkio, kaj pri la monotonaj tagoj kaj malfeliĉa sorto de la aŭtoro. Mikes estas unuaklasa observanto kun brilega humursento. La viviga forto de lia stilo estas la parolata lingvo de Transilvaniaj sikuloj (Hungarlingva gento, nun en Rumanio. – Red.), kiun li ankaŭ en fremda lando konservis pura.

El la hungara: P.A. *Rados*

Bernard Golden

La venĝo

Estis belega varma somervespero en Tampere, kaj la urbcentro estis plena de pasumantaj homoj ĝuantaj la postlaborajn horojn. Kelkaj sencele vagadis, aliaj rigardis en montrofenestrojn sur la ĉefstrato, kaj ĉie gejunuloj amindume promenadis brak-en-brake.

Subite motorciklo haltis vidalvide al kafejo, antaŭ kiu staris grupo da babilantaj kaj ridantaj junaj paroj. Altstatura blonda viro kun variolmarkita vizaĝo saltis sur la trotuaron kaj iris renkonte al unu el la paroj. Irja, la junulino, antaŭsentante, ke okazos io malbona, ekkriis. Lauri, ŝia kunulo, prenante ŝian manon, provis forkuri, sed la longa brako de la motorciklisto baris al li la vojon.

„Lasu lin, Vilho" protestis la timigita junulino.

„Vi, hundido, kion vi faras tie ĉi? Ĉu vi ne scias, ke ŝi estas *mia* ino?" muĝis Vilho. Li kaptis la ĉemizkolumon de Lauri per unu mano, kaj pugne kunpremante la alian, minace demandis: „Ĉu vi foriros, aŭ ĉu mi devos traviŝi la straton per via sentaŭga kadavraĉo?" Ne atendante respondon, la agresema blondulo trafis la vizaĝon de Lauri per pugnobato, kiu ŝancelis la atakiton.

Irja vane provis fortiri Laurin, kies ĉemizo jam komencis ŝiriĝi pro la tenajla preno de la atakanto. „Je la nomo de Dio, lasu lin, frenezulo. Ne kredu, ke mi interesiĝas pri vi, ĉar mi dancis kun vi unufoje la pasintan sabaton."

Tiu deklaro de Irja efikis furiozige je Vilho, kaj forpreninte la manon, kiu pinĉe tenegis Laurin, li komencis ambaŭpugne marteladi sian rivalon surkape kaj korpe. Por defendi sin Lauri delasis la manon de Irja, kaŭriĝis kaj provis forturni la pistantan pugnadon per siaj brakoj.

Amaso da scivolaj preterpasantoj jam ariĝis ĉirkaŭ la du luktantoj. Tuj elpaŝis kvar fabriklaboristoj, kiuj evidente havis sperton pri ĉi-specaj stratbataloj. Ili tiris flanken la du kontraŭulojn kaj trenis ilin al apuda aŭtobus-haltejo. La hurlanta kaj ankoraŭ baraktanta Vilho estis bruske ŝovita sur veturilon irantan norden, dum Lauri, tute sen rezisto, estis sidigita en aŭtobuso, kies celo estis la suda parto de la urbo. Post la foriro de la du ĉefrolantoj, la spektantaro same rapide malaperis, kaj amikino akompanis hejmen la plorantan Irjan. Kiam policanoj alvenis dek minutojn poste, nur la sangmakulita trotuaro atestis la misfaron, kaj ilia sola oficiala ago estis noti la registro-numeron de la motorciklo kaj skribi monpunan slipon pro kontraŭleĝa parkumo sur la ĉefstrato.

En sia luita ĉambro Lauri forprenis la cifonitan ĉemizon kaj iris al la banĉambro lavi sian kontuzitan vizaĝon kaj pansi la ankoraŭ sangantajn vundojn.. Dume, en sia nun malpli doloranta kapo li komencis kovi venĝon kontraŭ Vilho. Lauri hazarde ekvidis sur la planko sub la lavabo skatolon da ratveneno, kiun la dommastrino antaŭ nelonge aĉetis por liberigi la kelon de tiuj bestetaĉoj. „Ĝi taŭgas ankaŭ por alia besto," ekpensis la junulo, kaj li ne devis tro longe streĉi sian cerbon por meti tiun mortigilon en sian refrap-planon.

Li portis el sia ĉambro duonplenan botelon da biero, enversis kvanton da raticido sufiĉan por mortigi eĉ ĉevalon kaj poste plenigis la botelon ĝisrande per akvo. Zorge remetinte la kovrilon, li skuis la miksaĵon kaj kontente rigardis, kiel la pulvoro tute solviĝis. La bruna koloro de la botelvitro helpis kaŝi la konsiston de la toksa trinkaĵo.

Vilho laboris en la sama fabriko, kie Lauri kaj ankaŭ Irja estis dungitaj, do la plenumado de la venĝoplano estis relative facila afero, almenaŭ teorie. La sekvan tagon Lauri portis la botelon al sia laborejo kaj kaŝis ĝin en sia vestoŝranko. Dum la lunĉpaŭzo, kiun la laboristoj kutime pasigis en la ĝardeno de la fabriko, Lauri ensakigis la botelon kaj iris serĉi Vilhon. Tiu ĉi sidis sur benko kartludante kun aliaj viroj. Lauri alproksimiĝis, salutis lin kaj proponis la bieron kiel simbolon de repaciĝo. Vilho ekrigardis la botelon kaj, ĉu suspektante artifikon, ĉu agante pro denaska malico, ekstaris, fulmorapide tiris la botelon el la sako kaj per vasta brakssvingo ĵetis ĝin kontraŭ la malantaŭan brikmuron. La frakasiĝantaj vitropecoj ekhiĝis kun la raŭkaj ridegoj de Vilho. "Jen, trinku ĝin vi mem!" li rikanis. Eksplodo de rido venis de la laboristoj, kiuj observis la amuzan spektaklon. Sub la leŭkoplastoj la violkoloraj ŝvelintaj vangoj de Lauri ruĝiĝis pro tiu ĉi dua publika humiligo, kiun li ricevis de Vilho.

Tiun posttagmezon Lauri ankoraŭ ne kuraĝis serĉi Irjan por ekscii, kion ŝi opinias pri la okazintaĵo de la antaŭa vespero. Li povis pensi nur pri vengado. Pluraj planoj trakuris lian turmentitan menson, kaj se eĉ la plej malsevera el ili efektiviĝus, li riskus plurjaran malliberigon. Tamen, en sia nuna stato, la junulo tute ignoris tiujn sekvojn, kaj li fine tiris la konkludon, ke Vilho meritas la plej drastan punon. Li memoris pri la intrigo de televida filmo temanta ĝuste pri venĝo. Kokrita edzo elpensis perfektan krimon por mortigi sian edzinon. Informiĝinte, ke ŝi intencis aŭtomobile vojaĝi al najbara urbo, plej verŝajne por rendevuo kun sia amanto, la edzo malstreĉis kelkajn ŝraŭbojn de la aŭtomobila stirilaro. La virino malfacile povis direkti la veturilon, okazis karambolo, kaj ŝi mortis. Tamen, sperta esplorado fare de la polico malkovris, ke la stirrado estis tuŝaĉita, kaj kiam ili trovis, ke ŝraŭbŝlosilo mankis en la ilujo, ili rapide solvis la krimon.

Lauri decidis agi pli-malpli laŭ la scenaro de la filmo. Li difektos la motorciklon de Vilho, por ke la aĉulo suferu akcidenton. La ĉefproblemo nun estas akiri ŝraŭbŝlosilon. Li devas esti tre singardema, por ke oni neniam povu spuri ĝin al li. La plej simpla maniero fari tion, li pensis, estas forpreni unu el la fabrika ilar-deponejo kaj poste remeti ĝin, kompreneble forviŝante ĉiujn fingropremaĵojn por malhelpi daktiloskopian esploron. Li atendis la posttagmezan kafpaŭzon kun la espero, ke li povos eniri la ilar-ĉambron nevidite. Li rapide trovis la taŭgan ilon, sed li ne kalkulis kun la frua reveno de la deponeja ĵoranto.

„Kion vi faras tie ĉi?" grumblis la maljunulo. „Ĉu vi ne scias, ke estas malpermesite pruntepreni ilojn sen enskribi vian nomon en la kajeron? "

Lauri senvorte remetis la ilon en la ŝrankon kaj pafis sin for preter la mirfrapita viro.

Jam estis la fino de la labortago, kiam Lauri decidis alimaniere akiri la ilon bezonatan por realigi sian venĝoplanon. La sola eblo estis aĉeti ĝin. Li iris al la veturil-parkumejo, suriĝis sur sia biciklo kaj rapide pedalis en la direkto al la ur-

bcentro. Li intencis doni kelkajn markojn al stratbubo, por ke tiu ĉi aĉetu la ŝraŭbŝlosilon. Tiel neniu povos scii, ke li akiris ĝin. Haltante antaŭ granda magazeno, li konsterniĝis. Ĝi estis fermita.

„Kio okazis?" li demandis florvendistinon en apuda kiosko. „Kioma horo estas?"

„La kvina kaj dek" ŝi respondis. „Vi malfruas. Oni jam fermis ĉiujn vendejojn."

Lauri mienis eĉ pli kolere, ĉar samtage fiaskis du provoj satigi lian venĝemon.

„Ankaŭ mi baldaŭ fermos la kioskon," aldonis la floristino. „Rigardu, junulo," ŝi vokis, kiam li residiĝis sur la biciklo. „Ĉu vi ne volas aĉeti bukedon? Mi ne deziras porti la restantajn florojn hejmen. Jen, mi donos al vi ĉiujn kontraŭ nur dek markoj." Ŝi etendis al Lauri densan aron da buntaj diversspecaj floroj. „Portu ilin al via amikino. Vi certe ricevos unu kison por ĉiu floro."

Lauri ne bezonis tro da persvado. Elpoŝigante plenmanon da moneroj, li denombris la ĝustan sumon. Kun la bele envolvita bukedo enmane, li biciklis rekte al la domo de Irja.

Apenaŭ ĝirante ĉe la angulo de la strato kondukanta al lia celo, li ekvidis la motorciklon de Vilho antaŭ la domo de la junulino. Vilho apogis sin ĉe arbo kaj rigardadis al la fenestroj de la domo. De tempo al tempo li iris al la motorciklo kaj hupis por altiri la atenton de Irja.

Lauri restis sur la transa trotuaro por eviti novan alfronton kun tiu ŝajne nevenkebla antagonisto. Iu flankentiris la kurtenon ĉe fenestro de la dua etaĝo. Lauri spirhalte atendis, esperante, ke Irja ekvidos lin. Li svingetis la bukedon kaj ankaŭ mansignis. Ŝi delasis la kurtenon. Poste malfermiĝis la dompordo kaj Irja, tute ignorante la motorcikliston, kuris trans la straton. Prenante la budekon, ŝi brakumis Laurin kaj kisis lin.

Tio sufiĉis por Vilho. Li sidiĝis sur sia veturilo, spronis la startigilon kaj stakatbrue forrajdis. Kiam li estis nur nigra polvero en la fora distanco, Lauri ankoraŭ ricevis varmajn kisojn de Irja, kaj tiam li komprenis, kial oni diras, ke la venĝo estas dolĉa.

Mihály Ízes:

Al Zsuzsa Koncz

El poemciklo: „Fratinoj miaj, florara fluo"

Tutmonde plaĉa, bela birdo
flugas al betuloj:
ario simpla, ĝin kun mildo
aŭskultas, miras malriĉuloj.

Via hararo – betularo bela,
super frondaro flugilojn etendas
sola fluganto,
birdo de kanto –
atendas
je hor':
VENOS AŬROR'!
Inter floro tera
kaj verdo aera
flugas kun flirto,
MIRAKLA BIRDO!
Por mutaj
povruloj
sola
fluganto,
konsola
kanto!
Triladu do laŭte
pri ĝojo
turmento,
pri ena,
ekstera,
sufera,
ĝojplena
sento.

Aŭskultu ĉielo,
aŭdu tero,
aŭstkultu povruloj mildaj.
JA ANSTATAŬ ILI SONAS VIA KANTO!
Via hararo – betularo bela.
Ve, se mi povus esti parolanto.

Tr.: *Márton Fejes*

Kantistino Zsuzsa Koncz


Dr.Oetker
Pudingpor
Vanilia izü
Dr.Oetker
Pudingpor
Karamell izü
Dr.Oetker
Pudingpor
Csokoládé izü
40 g
4,40
40 g
5.0r
HUNGARA
DOLĈAĴINDUSTRIA
ENTREPRENO

Endre Illés

DILAŬDIDO*

Ni interkonsentu: la heroon de mia historio mi signos per ia ajn litero de l' alfabeto. Ĝi estu ekzemple la *D.* Sparinte la nomon, mi povas pli koncize rakonti la historion.

Pasis eble unu horo kaj duono en interluktado.

– Finfine, vi donas nenion? – demandis *D* en la antaŭĉambro, forirante. Laca li estis.

– Mi ne rajtas . . . – ripetis la kuracistino jam la dekan aŭ dudekan fojon ĉi-vespere. En ŝia okulangulo aperis larmoguto.

– Stulta ansero, vi – diris *D*, jam unutone, senkolere. – Tiel do vi observas la ĵuron?

– Kian ĵuron? – forviŝis la larmguton la virino.

– La kuracistan ĵuron. Ke vi helpos al ĉiu bezonanto.

– Precipe pro ĝi . . . Mi ne povas, komprenu! Mi ne rajtas!

D prenis la klinkon.

– Ne foriru tiel . . . – La doktorino kaptis la viron ĉe la brako. – Mi ne povas lasi, ke vi foriru . . .

Sed *D* jam ne respondis al tio. Nek al la vorto, nek al la malcerta gesto. Jam surŝtupare li ekpensis, ke li eĉ ne adiaŭis la virinon. Li haltis, tre laca li estis, serĉante apogon li kaptis la ŝtuparan barilon.

Kion li faru, kvindekkvinjarulo, kiu ĉiumatene ensovas du skatolojn da cigaredoj en la poŝon kaj ĉiuvespere li malfermas la trian. Ni konas la konsekvencojn: ĉiutage po kvindek cigaredoj pliigas la pulsadon, ŝvebigas la koron, ĝi povas kaŭzi eĉ perturbon en la sangocirkulado aŭ brustanginan spasmon. La sangopremo komence malaltiĝas, poste ĝi altiĝas kaŭze de la pliiĝinta adrenalin-ekskrecio de la suprarena glando. Aliflanke, la samaj kvindek cigaredoj pliigas la sangoprovizadon de l'cerbo, plifaciligante tiel la intelektajn laborojn kaj malpliigante la nervozemon, kaj ni ne forgesu tion, kio estas la plej grava: la fumo kaj ene de ĝi la veneno trankviligas.

Do, ankaŭ Maria rifuzis doni venenon. Tio ne surprizas lin. Domaĝe estis viziti ŝin, perturbante nur ŝian vesperon, eĉ ŝian sonĝon eble, tia ŝi estas – li ja scias tion.

Ĉi tiu Maria iam estis lia amatino, tio okazis almenaŭ antaŭ tridek jaroj. Ili interkonatiĝis en la glitkurejo, interpuŝiĝis, preskaŭ terenfalis, kaj ĉiaokaze ĉirkaŭbrakis unu la alian. Tiam Maria estis ankoraŭ Manjo kaj studentino pri medicino. Sufiĉe facile ŝi submetiĝis al li, ne estante jam virgulino. Skuiĝo post skuiĝo, ilia amrilato daŭris preskaŭ jaron kaj duonon, fine ili disiĝis sen vundoj. Kvankam vivantaj en la sama urbo, ili malofte renkontiĝis, eble kvar aŭ kvinfoje dum la tridek jaroj, en teatro, en nutraĵvendejoj, surstrate, foje en la aerodromo, ekflugontaj per malsamaj aviadiloj. Tiam ili konversaciis kvaronhoron, la knabino estis jam Maria kaj *D* eksciis, ke ŝi ne estis edziniĝinta. Sed daŭrigo de ilia rilato ne sekvis.

Post la morto de Lunjo, dum la pasintaj semajnoj, *D* faris provojn inkluzive ĉe tri el siaj kuracistoj-amikoj, fine ĉe du farmaciistoj, sed ĉiuj rifuzis lian peton, ĉu amikeme, ĉu obstine. Serĉante novajn konatojn li ekmemoris, neatendite, pri ĉi tiu iama, forpasinta amo. La tre strangan nomon de la knabino li ne forgesis kaj tuj trovis ĝin en la telefonlibro. Pertelefone ili interkonsentis, ke post ŝiaj akceptohoroj li vizitos ŝin.

La doktorino akceptis *D*-n en sia kabineto, en trankviliga, agrabla ĉambro, inter pentraĵoj kaj libroj, angule deĵoris kuŝejo por la malsanuloj, aliangule staris alta, kvadrata vitroŝranko, ene de ĝi sur la bretoj fermitaj, ŝikaj skatoletoj kun medikamentoj. *D* tralegadis la surskribojn, sed la vortoj de l'virino turnigis lin.

Post la unua kafo – iliaj frazoj nur iom varmiĝis – la senpacienca *D* ektuŝis la kernon.

– Donu al mi ian venenon, Manjo.

– Ĉu venenon? Kial vi bezonas ĝin?

– Nur tial, ke mi ĝin havu.

– Eble vi volas veneni iun?

– Se entute iun, tiu estos nur mi mem.

La kuracistino ekstaris.

– Ĉu vi deziras alian kafon?

D rigardis la virinon. Grizaj strioj en la hararo, sed ŝi estis ankoraŭ svelta. Ankaŭ la voĉo restis – kaj, evidente, ĉi tiu delikata enuo, ĉi tiu ioma malsaĝeto estas ankoraŭ la samaj virtoj, kiuj siatempe disigis ilin, pensis *D.*

– Tamen . . . pri kia vi pensis? – demandis la kuracistino strebante kvazaŭ bona lernanto, kaj ŝi elverŝis la duan kafon.

– Nu, pri ia forta. Eble pri morfino.

– Mi konas pli fortan ol ĝi – ŝi donis al li la kafon.

*Nomo de analgeziko.

Ilustrajo de László Kertész

– Ekzemple, la dilaŭdido trifoje pli fortas ol la morfino.

– Se estas tiel, donu tion.

– Mi povas doni recepton ankaŭ pri diamorfino. Ĝi eĉ pli fortas. Nur iom komplike, ĉar en la apoteko oni ne donas ĝin.

– Nek laŭ kuracista recepto?

– Ne. Nek laŭ ĝi. Ĉar la diamorfino havas ankaŭ alian nomon: heroino. Kaj heroinon oni ne rajtas transdoni en la apotekoj, nek laŭ kuracista recepto. Mi surreceptigas ĝin, se vi deziras. Vi provu.

Kaj ŝi priridetis la propran ŝercon.

Falsa, kiom falsa via rideto estas, via stulteta ŝerco, via familiareco, gustumis *D* la rideton de l'virino.

Kaj li ŝanĝis voĉtonon kvazaŭ li rebutonumos la misbutonumitan veŝton.

– Vidu, Manjo, vi devas aŭskulti kaj helpi min, vole aŭ malvole!

Kaj li komencis tuj.

La morton de Lunjo ĝis nun li rakontis kvinfoje, al surdaj kuracistoj, al surdaj farmaciistoj, nun li devas la sesan fojon finrakonti ĝin, al ĉi tiu virino gardita en vitroŝranko, sensulka ankoraŭ, kun blondaj, iom griziĝantaj haroj, kiun nudan li ĉirkaŭpremis en malprobable forpasintaj jaroj.

– Vi memoras eble pri Lunjo, ŝi estis mia fratino. Tiutempe ankaŭ al vi multe mi parolis pri ŝi, mi ege amis ŝin. Kiom facile mi eldiras, ke ŝi estis mia fratino. Estis, ĉar jam ŝi ne estas.

Li devis halti.

Ĉi-vespere okazis la unuan fojon, ke la kuracistino kaptis lin ĉe la brako.

– Mi konis Lunjon . . . – Iom ŝi atendis. – Ĉu ŝi mortis?

– Antaŭ tri kvaronjaroj – respondis *D*, tre mallaŭte.

Sed tuj li vekiĝis.

– Ne timu! Mi ne volas engluti vian venenon hodiaŭ aŭ morgaŭ, ne tial mi petas ĝin . . . Sed kiel Lunjo, tiel morti mi ne volas. Defendiĝi mi volas kontraŭ la morto. Vi ja komprenas? Ke ĝi trovu min preta kiam ĝi frapos la pordon. Mi volas fronti ĝin en ĉambra angulo, dorson kontraŭ la muro . . . Kaj la planon, kiun ĝi jam priforĝis en si, mi konfuzas, la palisumon, la radumon, la ŝtonumon. Mi mem plenumos ĝian devon, sed mi plenumos ĝin gardante mian rangon de homo. Mi ne toleros, ke ĝi puŝu min sur la plankon . . . Alvenante ĝi trovos min jam sur la planko . . . tial mi volas! Por tio bezonatas via morfino aŭ diamorfino . . .

– Kiel mortis Lunjo? – demandis la kuracistino. Nun senrimarke falis de ŝi la falsa ŝelo.

D stariĝis, ekiris tra la ĉambro kaj residis.

– Kiel? Antaŭ miaj okuloj . . . Dum tri semajnoj mi tenis ŝin ĉemane por ke ŝi restu ĉi tie . . . Foj-foje ŝi diris ion, kaŝe mi notis ĉiujn vortojn, por ke almenaŭ tiom restu el ŝi . . . Kvankam ŝi diris nur, mi petas akvon, aŭ la kusenojn mi devis ordigi, aŭ faldi pli suben la maldikan kovrilon, ĉar ĉiuj pezoj jam neelteneble sufokis ŝin. Kiel ŝi mortis, vi demandas, ŝi estis sensuspekta.

– Ĝis la fino?

– Eĉ unufoje ŝi ne demandis, kio okazos al ŝi . . . Ne ruzumante, ne esperante ŝi lasis, ke nur agu tio, kio akaparis ŝin . . . Obeeme, kvazaŭ vundita kapreolo, kun kuglo enkorpe.

– Kaj vi? . . . Kiam vi eksciis?

– Tuj. Sciu, ke mi havas grandan logejon, unu ĉambro apartenis al ŝi, ĉiujn miajn aferojn ŝi aranĝis, jam de jaroj ni vivis kune. Foje mi rigardis ŝin pli atente, kaj io ne plaĉis al mi. Eble ŝiaj okuloj, aŭ la vortoj, eble ŝiaj gestoj

Lajos Áprily

Peto al la oldeco

Oldec', disciplinant' de sango, sento,
instruu: softe iri al Silento.

Je plend' min ne incitu ĉe l'vivfino,
min la laŭteman garnu per sordino.

Simile al hirund' mi ne babilu,
al voĉmalriĉa korvo mi similu.

Konfidencemo-puton via mano
enŝtopu; iĝu mi kartuziano.

Babilas nur stumblanta roj' mallerta,
ĉe l' delt' silentas riverego sperta.

Ho, savu min de homoj multparolaj,
de l'libroj vortinundaj, senmedolaj.

Ĉe l' Fin' nur kurtan radikvorton donu,
vorteton senpatosan mi disponu,

ke al demand': (ĉe transa bord' magneta)
„Ĉu preta estas vi? – mi diru: „Preta".

El la hungara: Julio Varga

estis maltrankviligaj. Mi kunportis ŝin al amiko, profesoro, kiu diris, ke dum kelkaj tagoj ŝi restu en la kliniko. Post du tagoj la profesoro vokis min, ni eksidis en lia ĉambro. „Malbonan novaĵon mi havas por vi", komencis mia amiko. „Vi komisiis min pri io, do mi parolu malkaŝe. Por via fratino restas kelkaj semajnoj, sed eble nur iom da tagoj. Rigardu . . ." Kaj li alŝovis antaŭ min koloran foton radiologian. „Mi nun lasas vin sola por kvin minutoj", ekstaris mia amiko. Nu, tiel mi eksciis. Li trovis lokon en mia koro, pro la malkaŝemo. Li sciis, ke tiel li devas paroli kun mi. „Semajnoj?", demandis mi, post kiam li revenis. Aprobo. „Tiukaze, mi portas ŝin hejmen." Li protestis. „Vi ne scias kion vi entreprenas. Ĉi tie estas kuracistoj kaj flegistinoj, ili kune prizorgos vian malsanulinon." – „Tre bone, mi scias, kion mi entreprenas. Se ŝi devas morti, do ŝi mortu hejme, sur la propra lito kaj la propraj kusenoj, inter la propraj mebloj, ĉiuj aĵoj ĉemane, en sia ŝate konata ĉambro. Tiel eble ĝis la fino mi kapablos prokrasti la tagon de l'konsciiĝo." – „Vi kolapsos." – „Mi eltenos surpiede. Ĉar tre elegante lasi niajn malsanulojn en la kliniko, hospitalo, kaj enaŭtiĝi post la vizitaj horoj, hejmeniri kaj vespermanĝi. Al mi donos forton tio, ke eĉ la lastan fojon mi povos doni al ŝi donacon, kelkajn senvenenajn tagojn"

Denove ni alvenis ĝis la veneno.

– Nun vi jam scias, kial mi ĝin bezonas?

La kuracistino evitis respondi.

– Ankoraŭ vi ne diris, kiel ŝi mortis.

– Ĉar vere mi ne scias. Hejme ŝi estis, sed neniam plu englutis eĉ pecon. Dum ioma tempo, ovoflavo miksita kun konjako tenis ŝin viva. Ŝi malgrasiĝis ĝis dudek kilogramoj, povas esti, ke malsatmortis. Aŭ sufokiĝis, ĉar ne havis fortojn eĉ por ekspiri. Kaj povas esti, ke soifmortis, ĉar je la fino ŝi elvomis jam eĉ guton da akvo.

– Kaj vi estis kun ŝi?

– Ĉiunokte mi tenis ŝin ĉemane. Nur nokte, ĉar tage ŝi certe eksentus en mia premo la finon.

Li kriis al la virino:

– Sed mi ne volas finiĝi tiel! Nur poltronuloj, merduloj konsentas tion.

Li eksaltis.

– Donu jam tion, kio liberigas!

La virino ankaŭ ekstaris.

Ambaŭ jam staris.

– Nenion mi povas doni.

– Kaj vi, kiel vi volas morti?

– Obeeme.

– Ĉar idioto vi estas.

– Idioto mi estas.

Nur tiam ili ekvidis, ke la kuracistino staras antaŭ la vitroŝranko de medikamentoj.

– Malfermu!

– Mi ne malfermos.

D kriis.

– Se vi spitas, mi forpuŝos vin.

– Forpuŝu.

Iliaj koroj batis pro manko de oksigeno, la densiĝinta aero kovris ilin kvazaŭ peza fiŝreto.

Fine la viro vekiĝis kaj retrois.

– Pardonu, mi jam ne scias, kion mi diras. Sed memoru! . . . Vi estis la mia, nuda vi estis la mia. Vi ne rajtas rifuzi, kion nun mi petas de vi. Vi ne rifuzis doni eĉ vin mem.

– Nun mi rifuzas.

– Kaj se mi treege petas vin . . .

– Vane.

– Se mi ĵuras, ke ĝis la lasta momento mi prokrastados ĝin.

– De kie vi scios, ĉu jen la lasta momento?

– Koncerne Lunjon mi precize sciis.

– Ĉar oni sciigis tion al vi. Sed pri vi mem, kiu ĝin diros?

– Ekzemple vi.

– Malpermesas la ĵuro.

D denove eksplodis, sed jam estis laca.

– Idioto vi estas.

– Vi jam diris.

Ili eksidis kaj silentis ĉirkaŭ dek minutojn. Poste *D* stariĝis, kvazaŭ svenonte serĉis per la rigardo la pordon de l'antaŭĉambro kaj ekiris. La virino senvorte sekvis lin. En la antaŭĉambro ili haltis kaj interŝanĝis ankoraŭ kelkajn frazojn, kaj poste, en la ŝtuparejo, *D* longe tenis preme la barilon – tio estis la sesa fiasko.

Ĉi tiu misvojiĝinta konversacio daŭris la plej longe. Unue ekaperis nur kiel kaprico, sed baldaŭ li kaptis ĝin sensence spasme: tio devas sukcesi, kaj kvazaŭ li paŝadus inter kvadratoj de ŝaktabulo, li peladis sin ĝis ĉiam pliaj kaj pliaj atakoj. Senespere, li sciis.

Kiom obstina adversulo estas la ĉiutaga ordo de l'mondo. Ĝi maskas sin ŝajnigante etikon, kvankam nur ŝtoniĝinta armea reglamento ĝi estas. Ĉiu eksperimento fiaskas se la tralas-membranoj estas eltranĉitaj el bovkisto.

D unue parolis kun sia malnova amiko, doktoro, ili estis lernejkamaradoj kaj sidis unu apud la alia, dum jaroj, en la benkoj de l'gimnazio. Tiam li kondutis ankoraŭ malkuraĝe, honteme ĉirkaŭiris la kernon de la peto. La amiko elektis la plej simplan taktikon: li eĉ ne aŭdis la cirkonspektajn aludojn de *D.*

Ĉe la dua provo li pli kuraĝis, sed li sukcesis formuli sian deziron tro nude, eĉ li mem opiniis, ke la rifuzo estis justa. Poste li rafinis la aludojn, senrezulte. En ia apoteko finludis la dramon de l'scivolemo, per ruzaj demandoj li konfesigis sian amikon, la farmaciiston, li konatiĝis kun indikoj pri *pro die* kaj *pro dosi* – vane. La kvara amiko aŭskultis lin kompleze kaj kompreneme – nu, jes, vi pravas, jes, jes ja, ĉiel mi helpos vin, „tiam, siatempe". – „Sed ĝis tiam?" – „Vi mem diris, ne urĝas, ni atendu nur." – „Sed mi bezonus sekurecon." „Bone, bone. Poste."

La kvina estis konciza kiel masiva ŝtono. „Ne" – li diris. Kaj ne eblis daŭrigi la konversacion.

Vi ne komprenas do, disputis kun ili *D:* la vivo estas natura stato, ankaŭ la morto, sed ne licas kunligi ilin per malvasta, longa, fiodora musejo, kiun ni devus trairi penege, sufoke, kun turmentoj, malpuriĝintaj. Humiliga solvo. La vivo estas daŭra mortdanĝero – mi akceptas. La doloro okupas signifan parton en la enhavo de nia vivo – mi akceptas. Kiun pelas al morto ia malfeliĉo – estas homo kun misa logiko, ne permesatas aŭskulti lin. Sed ne estas la mortdanĝero, la doloro, la malfeliĉo kion mi malakceptas, mi volas nur validigi en mia vivo la leĝon de l'libera falo: en la lasta fazo, fari *el akceliĝo akcelon.* Jen samrajta homa deziro kiel tio, ke mi marŝas per du piedoj, kaj en nenia situacio mi lasas min devigi al mana-pieda stato, nek ĉe la finfino. – „Sekve tiu, kiu tiel faras, rezignas pri la rango esti homo?" – demandis amiko. „Ne – respondis *D.* – Temas nur pri mi. Ĝis kiam mi ne estas *res,* nome aĵo, ĝis kiam mi vivas, mi havas rajton pri mi mem. Rajton por decidi pri mi mem."

Li enaŭtiĝis.

– Haltu ĉe tiu ĉirkaŭtrabita domo!" – li donis instrukcion al la ŝoforo.

La morto de Lunjo estis ankoraŭ *estanto.* Tiu domo kuntenata per traboj, ankaŭ *ĉeestanta,* sufoka stato.

Post la morto de Lunjo invadis lin lavango. La pluretaĝa vilao estis konstruita ĉirkaŭ la jarcentŝanĝo, ĝin konstruigis simplulo, malmultekoste, el forĵetitaj materioj, kaj ĝis nun oni devis ŝanĝi jam preskaŭ ĉiujn ĝiajn erojn. La renovigistoj tranĉis la kondukilojn unu post la alia, de la gaso, akvo, elektro, kaj novajn tunelojn ili gravuris en la murojn por la novaj kondukiloj. Ili forrazis la balkonon, ĉar eviti ĝin malhelpus en la starigo de l'trabaro. „Ĝi ĉiel fuŝas la fasadon – ili trankviligis *D*-n – ni ne plu ĝin restarigos." Kiam ili debategis la morteron per pezaj marteloj kaj elektra borilo, la muroj fortvoĉe plendis kvazaŭ kontrabasoj, ŝrikante kelkfoje, kaj surdiĝis la telefono – tiam li translokiĝis por kelkaj tagoj en hotelon. Li devis reveni por pendigi la tapiŝojn antaŭ la rompitaj fenestroj kaj movadi la meblojn de ĉambro en ĉambron. Kie antaŭe estis balkono, nun videbliĝis giganta faŭko, eĉ fojnĉaro povus tie enpremiĝi, kvankam iom pene. „Ĉu vi dormas kutime per piloloj?", demandis *D*-n la brigadestro de l'masonistoj. „Per eŭnoktino*". Sed ne tio interesis la brigadestron, ĉu per eŭnoktino aŭ per alia narkotiko li dormas – li volis doni pli bonan konsilon. „Mi konsilas al vi, ĝis ni ne enmasonos ĉi tiun truon, nokte metu ferstangon apud la liton. Iu ajn kapablas simple enpromeni en vian ĉambron, de la trabaro." Li dankis pro la konsilo. La telefono ankoraŭ estis surda.

Baldaŭ oni dispistis la kahelojn el la banĉambro per oportunaj iloj, forĵetis kuvon, lavopelvon – tio estis jam alia, pli morna brigado. La deka. Okazis tiam, ke li denove estis devigata iri en hotelon, ekzilita por dek tagoj.

Printempa vespero estis, kiam *D* elaŭtiĝis, venante de l'doktorino. La eta vilao ripozis en la malhelo, vundita, sed jam bandaĝita, ĝia febro malaltiĝis. Li alvenis ĝis la enir-

**Dormig-pilolo.

pordo inter bareloj, tuboj, dratoj, ĉaretoj por portadi morteron, apud la ŝtuparo tabuloj el vitro staris kontraŭ la muro – la hejmo de *D* troviĝis en la unua etaĝo. En la loĝejo jam estis elektro, el la krano jam fluis akvo. Mi baniĝos, ekpensis avide *D.*

Sed plej unue li deziris gluton da trinkaĵo, da ia forta trinkaĵo, eble da pura viskio. Li ensŭovis la ŝlosilon de l'kamero en la truon, malfermis la pordon – ankoraŭ pasintvintre li metis ĉi tie sur la bretojn kelkajn botelojn da alkoholaĵo, konjakon, viskion kaj prunbrandon, ĝinon, blankan rumon, armenan brandon, prepariĝante al la malfacilaĵoj de l'renovigo kaj al la soifo de l'renovigistoj. La boteloj estis tiam vicigitaj sur la breto sub la alte situanta fenestreto de l'kamero.

Lia rigardo serĉis la viskibotelojn, la breto malplenis.

Li eniris la kameron, en la nemiskompreneblan situacion: la fenestreto estis enpremita, tre lerte, per gluita pakpapero, sen bruo kaj vitreroj, poste iu, de la ekstera trabaro, trapremiĝis la mallarĝan fenestron kaj kaŝis en mansako la botelojn plenajn da alkoholo, ĉiujn ok – aŭ estis eble eĉ dek? *D* neniam nombris ilin. Eĉ nun li vidis nur la vicon, la malsamajn kolorojn de l'trinkaĵoj kaj la variajn etikedojn – *en estinteco.*

Do, jes . . . Ĉi tiuj ne metis apud sin ferstangon.

„Ĉu tiom malkare mi transsavis min?" La travivaĵo de l'unua minuto estis la ĝojo. Ĝojo kaj trankviliĝo. Kion li timis dum semajnoj – pasis. Malpeziĝinte, li ĝemis.

Sed la breto havis eĉ alian surprizon. De la breto, kvadrata, violkolora skatoleto rigardis *D*-n defie. Kiu (aŭ kiuj) forportis la botelojn, metis zorgeme la skatoleton mezen de l'malplena breto.

D alpaŝis kaj prenis la skatolon: *dilaŭdido,* li legis la surskribon de l'blanka etikedo. Li nur rigardis, rigardadis, ensorĉita: *dilaŭdido.* Deŝirinte la supron de l'skatoleto, li vidis akrapintajn turetojn, la ampoloj staradis en vicoj, po kvin, plaĉe, bonkondute: *dilaŭdido.* Pakitaj en fabriko, ĉiuj kvindek ampoloj: ĉiuj, *dilaŭdido.* Li eligis unu el la turetoj: sub la marko *dilaŭdido* la nomoj de l' fabriko kaj fabrikanto: *Knoll.* Estis bela la ampoleto, ĝia enhavo pura kaj diafana: *dilaŭdido.* Tiu *dilaŭdido,* pri kiu precipe hodiaŭ li aŭdis incitajn vortojn: analgeziko tri-kvinfoje pli forta ol la morfino.

Dum tagoj, dum semajnoj li pelis la garantiaĵon: li ne volis enpremiĝi en la musejon, li ne pereos tiom senpove, tiom sendefende, luktante dum noktoj kun sovaĝaj doloroj, kiel adiaŭis lin Lunjo.

Savita li estis.

Neatendite li ekposedis multegan *dilaŭdidon,* antidoton sufiĉan por tri, kvar, kvin mortoj.

Tamen, kiu donacis al li ĉi akrapintajn turetojn? Ĉu tiom fortas la homa deziro, ke finfine ĝi korpiĝas? Liaj manoj tremis, tremis ankaŭ la turetoj en la skatolo.

Sovaĝa timo atakis nun *D*-n: *li songas.* Tiom nerealan kontentiĝon povas doni nur la songo. Li staris ankoraŭ en la kamero, surfrunte gutis ŝvito. „Se mi nun eniras la ĉambron, kaj ankaŭ tie mi tenos enmane ĉi violkoloran skatoleton, kaj en ĝi mi trovos ne ĉokoladon, sed mi tuŝos la akrapintajn turetojn de *dilaŭdido* – tiam eble tamen mi ne songas!"

Singarde li turniĝis, singarde li eniris la ĉambron, ankoraŭ en la mallumo li tuŝis perfingre la turetojn: ili iom pikis. Eklumiginte la ĉambron, la duan fojon li eligis ampolon: *dilaŭdido (Knoll),* li legis la literojn apenaŭ videblajn.

Konsternite li sidiĝis. Flamoj atakis abrupte la maldekstran vangon, de mentono ĝis verto, reaktivis lia konstanta malsano: kruela atako de *trigeminus neuralgia.****

Kvazaŭ elŝaŭmanta lakto, liaj pensoj bolis. Ili nur disfluadis.

Mirakloj ne ekzistas, li ripetadis en si. Tion faris ŝtelistoj, nur ili povis fari. Sed vere, estis ili? Se ne, kiu? Li suspektu eble siajn amikojn: ili suprengrimpis la trabaron, rompis la kameran fenestron por meti tien, anonime, maron da savantaj *dilaŭdidoj?*

Nur la ŝtelistoj. Nur ili.

Sed kiamaniere ili havigis al si tiom da *dilaŭdido?*

Knaboj disĵetadas tiel la ŝelon de arakidoj kiel li nun ĵetadis ĉirkaŭ sin la ariĝantajn klarigojn. Fine li haltis ĉe iu el ili.

Matene li demandis la estron de l'konstruado:

– Ĉu vi laboras multloke?

– Kvin domojn ni renovigas ĉi tie, en la ĉirkaŭaĵo, kaj ankaŭ hospitalon.

– Hospitalon?

– En la apuda distrikto.

Pasintvespere, ekdormante, ankaŭ *D* alvenis al ĉi tiu solvo. Renovigante hospitalon, iu iel ajn havigas al si skatoleton da kuraciloj, rapide kaŝas ĝin en la mansako, kaj pli poste, en alia domo li sukcesas ŝtelrompi fenestron, kaj tiam li forĵetas la stultan, superfluan skatoleton, por ke li povu ensŭovi en la mansakon pli utilan rabaĵon.

Sed en la kormuskoloj de *D* plu vibradis la nerealeco de l'miraklo. Eble eĉ kardiografo kapablus registri ĝin.

Li rigardis, rigardadis la estron de l'konstruado. Kvazaŭ li naĝus en glacia akvo, inter glacitabuloj, kun spasmintaj muskoloj, sed li jam scias, feliĉa, lian gorĝon tranĉos ne la glacitabuloj, antaŭ tranĉiloj, akraĵoj, doloroj li povos en la lasta momento fuĝe subakviĝi ĝisfunden, kien jam nenia lumo de l'tera ekzisto kapablas lin sekvi.

Tradukis:
Zsuzsa *Varga-Haszonits*

***Malsano de vangonervoj.

MIHÁLY VÁCI

Deveno

Ne tio markas la devenon, rangon:
pri kiuj iu fanfaronas?
sed tio: kiuj fanfaronas pri li,
al kiuj lia nom' imponas?

Ne pri merit' malpropra mi fieras,
mi ne komencas per deven-deklaro,
sed ŝatus fari ion antaŭ ĉio
por montri: mi je adoptiĝo indas,
kaj havas rajton pri la parencaro.

Mi ŝatus fari foje ion,
pri kio retrovitan sian idon
rekonas la parencoj simplaj, foraj!
Menciadante mian faron, ili
al mi glorigajn nomojn donas,
anstat' mi ili ege fanfaronas:
– „Devenis de ni li!"

El la hungara: Julio Varga



Antal Dévényi: Danubkurbo ĉe Viŝegrád

La sonĝo de naiva pentristo

En multaj hungaraj urboj, kulturdomoj funkcias artaj rondoj – por amatoroj. Inter iliaj membroj troveblas metalurgiistoj, oficistoj, kamparanoj, inĝenieroj kaj pensiuloj, kiuj post la ĉiutaga laboro tre ŝatas la arton, do ili desegnas, pentras, skulptadas. Ili estas tiuj, kiuj gardas profunde en siaj koroj la grandan sonĝon, sed ne havis eblecon elekti la arton kiel vivdestinon. En ĉi tiuj rondoj la membroj lernas ankaŭ anatomion, arthistorion, kompreneble nur modestnivele, (iliaj gvidantoj estas artistoj), tamen tiuj konoj helpas al ili trovi propran voĉon, karakterizan stilon. El ili jam estas kelkaj, kies kreaĵojn oni povis vidi en Hungario, eĉ en eksterlandaj internaciaj ekspozicioj por naivaj artistoj.

Antal Dévényi (naskiĝis en 1910) estas unu el ili. Li estis presisto, sed pro siaj vivcirkonstancoj li devis atendi la momenton, kiun signifis por li la pensiiĝo. Tiam (1967) li komencis pentri tuj, kaj jam la unuaj bildoj havis la proprajn trajtojn de naiva arto. La unua kolora paŝtelo: *Konifero en Ŝopron* – rolis sukcese en Winterthur (Svisio, 1972) kaj ankoraŭ dum la sama jaro en Budapeŝto, en la unua landa ekspozicio, kies titolo estis: *La hungara naiva arto en la 20-a jarcento.*

La rezulto de jardeko: individuaj kaj kolektivaj ekspozicioj hejme, eksterlande, kaj dekdu muzeoj, galerioj en Hungario, kiuj havas bildojn de Dévényi en siaj kolektoj.

Kion pentras Antal Dévényi? La neforgeseblajn travivaĵojn de la infanaĝo, *(La malnova Óbuda)* memorojn de iama migranta presistfraŭlo. Li pentras sian nepinon, *Márti* kaj *Memprotreton,* la orfiĝintan knabinon *(Post la milito),* laborantan kaj ripozantan homon *(Siesto),* la ŝatatajn pejzaĝojn de nia lando *(Danubkurbo ĉe Viŝegrád)* kaj perspektivon el sia kuirejo *(Mia artlaborejo).*

Antal Dévényi: La malnova Óbuda

La samfakuloj, kritikistoj ankoraŭ hodiaŭ diskutas: ĉu la naiva arto estas parto de la tuta, ĝenerala arto? Sed depost Henri Rousseau (1844–1910) kaj la kartvela Niko Pirosmanaŝvili (1862–1918), unuaj mondfamaj talentoj de naiva pentrarto, estas nekontesteble, ke ankaŭ ĉi tiu specifa prezentmaniero estas vera arto. Sen ĝi estus nia epoko malpli riĉa.

Mihály *Gergely*

PANORAMO

La ĉambro de Zsigmond Móricz en la familia domo en Leányfalu

Móricz-memorajoj en muzeo

Okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de Zsigmond Móricz lia familio transdonis ĉiujn liajn postlasitajn manuskriptojn, korespondaĵon, notojn, fotografaĵojn, meblaron de lia ĉambro kaj liajn librojn al la ŝtato. La kontrakton subskribis la filinoj de Zsigmond Móricz kaj Sándor Boros, vicministro de Kulturo. Kunlaborantoj de la Literatura Muzeo „Petőfi" de Budapeŝto jam komencis la prilaboron de la tre valora kaj riĉa materialo.

Relikvoj de pasintaj tempoj

„Vivo de infanoj en la malnovaj hungaraj vilaĝoj" estas la titolo de interesa ekspozicio en la Etnografia Muzeo. Ĝi prezentas objektojn, kiuj ĉirkaŭis kamparanojn de la naskiĝo ĝis la junaĝo. Luliloj, infanmebloj, paŝigiloj, ludiloj kaj infanvestaĵoj estas ekspoziciitaj.

Fotoj: Béla Somhegyi

Objektoj, ludiloj, iam ĉirkaŭintaj infanojn, en la ekspozicio de la Etnografia Muzeo

Danubo-bordo de Pe
En la mezo estas Hotel Duna I
Sur la loko signita estos konstruata l



PANORAMO

Maurice André kun la kamerorkestro „Liszt Ferenc" en la koncertejo de la Budapesta Muzika Altlernejo

Nova hotelo sur la maldekstra bordo de Danubo

Reprezentantoj de *Hungarhotels* kaj de *Intercontinental Hotels Corporation* subskribis kontrakton pri kunlaboro rilate al funkciigo de la konstruota hotelo *Forum* sur la Danubo-bordo de Peŝt. Laŭ la kontrakto inter la hungara kaj aŭstra registaraj organoj ĉi tiu hotelo estos unua inter aliaj konstruotaj hoteloj el aŭstra kredito.

La hotelon de 408 ĉambroj, same kiel la proksiman *Duna Intercontinental* planis kolektivo de planinstituto *Lakóterv* kun direktado de József *Finta,* plurfoje premiita arkitekto. Ĉe elformigo de la eksteraĵo oni konsideris la vidpunktojn urbanistikajn kaj tiujn de la ĝenerala vidaĵo de la Danubo-bordo. La hotelo estos establita laŭ pretendoj plej altaj kaj modernaj.

ŝto.
ercontinental.
nova hotelo Forum



Francaj-hungaraj muzikaj interŝanĝoj

Jacques *Chirac,* urbestro de Parizo transdonis en la urbo-domo la premiojn de la muzika konkurso „Maurice André". La hungara ladblovorkestro „Reneszánsz" gajnis la ĉefpremion en la kategorio de ensembloj.

Maurice *André,* la fama franca trumpet-artisto estas tre populara en Hungario. En la lastaj jaroj li koncertis en ĉiu sezono en Budapeŝto antaŭ entuziasma publiko en plena koncertejo de la Muzika Altlernejo.

Maurice André

Hungara prezidanto

Hungaran prezidanton elektis la Internacia Ligo de la Asocioj de Tekstil-kemiistoj kaj Kolorigistoj. En la asembleo en Baden-Baden oni elektis profesoron István Rusznák, prezidanton de la hungara membro-asocio por tri jaroj al ĉi tiu ofico.

La nova Danubo-ponto ĉe Győr

La malnova ferponto de Győr baldaŭ ekripozos kaj samtempe ekspiros ankaŭ la centro de Győr, ĉar la nova ponto estas konstruita iom malproksime de la interna parto de la urbo. Tiel plej granda parto de la aŭtoj kaj kamionoj senĝene povos iri sur la kvar koridoroj de la ŝoseo apud Győr. La ponto estas kvincent dudek kvin metrojn longa kun plej granda aperturo-distanco en Hungario.

Sonĝo realiĝas

Antaŭ ne longe ŝajnis ne efektivigebla sonĝo *kanalo* kunligonta Danubon kun la maro Egea. Tiu sonĝo baldaŭ aperos jam en konkreta formo sur la tabloj de projektistoj. La programo pasintjare estis deklarita necesa kaj ebla fare de la Eŭropa Ekonomia Komisiono de UN, kaj tiel ĝi estis akceptita en laborprogramon de la organizo. La prilaborado de la studprojektoj finiĝos jam en ĉi tiu jaro. La Eŭropa Ekonomia Komisiono zorgos pri la projektado kaj la Evoluiga Programo de UN kontribuos al la efektivigo konforme al la kontrakto jam subskribita de la registaroj jugoslava kaj greka.

La kanalo sekvos la valojn de la riveroj Morva kaj Vardar. Certe estas atendeblaj la kunlaboro kaj la kontribuo de ĉiuj landoj, kiuj speciale estas interesataj en la funkciigo de la estonta akvovojo.

É.Farkas-Tatár

Versaj korespondaĵoj

Marjorie Boulton – William Auld:

Rimleteroj

Kiel la titolo de la volumeto montras, ĝi enhavas la versan korespondadon de la du poetoj. Ĉar temas pri korespondado, kiu estas ĉiam privata afero, oni ne devas atendi ĉefverkojn. Tamen la poetoj diferencas de la mezuloj precipe en tio, ke ili estas pli problem-sentemaj, kaj en tio, ke iliaj privataj problemoj plejparte koincidas kun la grandaj mondproblemoj. Do ankaŭ en ĉi tiu versa korespondado ni retrovas la problemojn de la kvindekaj jaroj, kiuj plejparte estas ankaŭ hodiaŭ vivantaj problemoj.

La leteroj estis skribitaj inter la 27-a de septembro de 1953 kaj la 8-a de majo 1954. Do, en la jaroj de la tiel nomata „malvarma milito". Inter tiuj cirkonstancoj la ebloj de la homa vivo okupis la poetojn. Preskaŭ sendepende de la temoj, ili ĉiam alvenas al la fina demando: „Kiel ni vivu?". Tio estas ĉiam aktuala demando, kiun metas, kaj devas meti ĉiu verkisto. Sed kio estas la respondo? Kiu sinteno skizigas surbaze de la poemoj? Ĉiuj du poetoj estas karakterizitaj per ia malfacile difinebla „moralisma idealismo". Ĉe M. B. ni trovas ian profundan indulgeman homamon, radikantan certe en ŝia dikredo, kiu certigas al ŝi optimismon. (34) Ĉe A. kontraŭe, ni renkontas alian specon de la humanismo, kiu estas karakterizebla per la verso de Attila József: „mi koleras por vi, ne kontraŭ vi". La mondkoncepto de A. estas pli pesimisma ol tiu de B. (75). Laŭ A. ĉiu ideologio, ĉu kristana, ĉu komunisma nur malhelpas la homan interkomprenon. Tio estas tipe idealisma opinio, same kiel tio, ke li kulpigas la edukan sistemon pro la problemoj. Pri tio ankaŭ M. B. konsentas, sed ĉar optimisma, ŝi opinias, ke per la edukado oni solvos la problemojn. Kvazaŭ ni aŭdus la eĥon de la klerismo, precipe tiun de la ideoj de Rousseau.

Kio koncernas la temojn, ni trovas larĝan spektron de ili en la poemoj, de la Kristnaskaj bondeziroj, ĝis la jam menciitaj problemoj. Rezulte de la historiaj cirkonstancoj de la „malvarma milito", aperas ankaŭ la timo pri la mondpaco (6) kaj la vizio de la mondfino kaŭzota de ia „potenca bombo" (22, 39). Ĉar la korespondantoj estas poetoj, la problemoj de la poeta verkado ankaŭ aperas (4, 5, 50); *„Generas arton malkontento"* – diras A., kaj li pravas. El tia poemaro ne povas manki la reciprokaj rimportretoj (17, 23). Sed plejparte temas pri la eblaj sintenoj de la homo en tiu epoko. Konekse kun tio, la poetojn okupas ekzemple la interrilato de emocioj kaj racio, kaj la demando: „Ĉu la homo estas origine bona aŭ ne?". Evidente la respondo de B. estas jesa, kaj tiu de A. estas plie nea, sed ili ambaŭ ne pravas, ĉar al tiu mise metita demando ne ekzistas respondo. Aperas ankaŭ la eblo de la postmorta vivo. (36, 37, 38), kiu estas „ĥimero" por A. kaj potenca konsolo por B.

RIMLETERO 75

De Auld al Boulton 1954. 03. 26.

Renaskiĝanta naciismo!
La velka arbo puŝas sprosojn . . .
Ĉiajn misfaktojn kaj patosojn
uzas rabia paroksismo

de histerio. Raciismo
ĥalflusas, kreas la etosojn
renaskiĝanta naciismo:
la velka arbo puŝas sprosojn . . .

La homoj, antaŭ kataklismo,
ne vidas siajn pens-provosojn.
Starigas novajn mond-„kolosojn"
ĉie, arkantajn trans abismo,

renaskiĝanta naziismo.

Ĉar temas pri E-istaj poetoj, la problemoj de E-o ankaŭ aperas. Ili interkonsentas pri tio, ke E-o kiel lingvo, per sia klareco certigas pli da ebloj por la poeta verkado ol la naciaj lingvoj. Temas ankaŭ pri la movado, kiu *„ne tre movas"* (55). Rilate E-on, ni retrovas ankaŭ la problemon de sennaciismo, de naciismo. A. opinias, ke la naciismo naskas facile naziismon, li tion esprimas en bravura poemo (75), kiu estas unu el tiuj poemoj, kiuj kapablus memstare vivi.

Laŭ la formo, la poemoj estas rondeloj. Do la elekto de tiu mezepoka formo jam en si mem anoncas, ke temas pri poeta ludo, el kiu nur hazarde povas naskiĝi ĉefverkoj. Tamen la rondelo havas tradicion en la E-a literaturo, ĝi estas la formo de la „Rimportretoj" de Kalocsay, kaj poste ĝi igas la tradicia formo de tiu speco de poemoj.

Do ni konatiĝu kun la rondelo. La plej okulfrapa estas ĝia refreno. La poemo ĉiam konsistas el 13 versoj, el du kvarversaj strofoj, kaj el unu kvinversa strofo, laŭ la skemo: (A, B = la ripetataj versoj) ABXX XXAB XXXXA. La rimado estas bazita sur du rimoj, *a* kaj *b*, tio estas ke ĉiam a = a, kaj b = b. La tipa rimaranĝo estas: *abba abab abbaa.* Foje ni trovas aliajn rimaranĝojn, sed ili ne estas tipaj, ĉar ili prezentiĝas nur unufoje. Ili estas la jenaj: *abba baab abbaa, abab abba abbaa, abba abab ababa.*

Ekzamenante la longecon de la versoj, ni trovas, ke la tipa longeco estas 9 = silaba. En 6 el la rondeloj ni trovas la regulan alternon de 8-silabaj kaj 9-silabaj versoj laŭ la skemo: a = 8-silaba, b = 9-silaba au inverse, do la alterno de la longeco estas paralela kun la alterno de la rimoj. En unu el la rondeloj de B. ni trovas unu 10 silaban verson inter la 9-silabaj, sed tio estas manifestiĝo de la poeta licenco.

La refreno teorie devus esti senŝanĝa, sed praktike – ĉirkaŭ en dudek poemoj – ĝi estas iomete ŝanĝita. La ŝanĝoj ĝenerale ne estas grandaj, temas pri ŝanĝo de interpunkciaj signoj, aŭ ŝanĝo de la grafiko de la sama sonkorpo (olda – Aulda 66., porke – por ke 34.) aŭ ŝanĝo de unu litero (naciismo – naziismo 75), kaj la ŝanĝo de la konjunkcioj aŭ subjunkcioj aŭ de la partikloj estas relative ofta.

Kio koncernas la lingvon de la poetoj, ni konstatas, ke ili majstras la lingvon, ili ekspluatas ĉiujn ĝiajn eblecojn, sen krei neologismojn, kaj sen endanĝerigi la kompreneblecon, ĉar ni tuj komprenas, kion signifas „la mio", „jezuo-kristas" (27), aŭ „riĉas" (2), aŭ „Virinas mi, kaj vi tre viras" (56).

Resume: el la Rimleteroj ni ekkonas du esperantistajn poetojn, kiuj klopodas esprimi nian komplikan mondon kun profunda respondeco kaj problemsentemo. La postepoko decidos, ĉu ili sukcesis aŭ ne.

Éva *Soós*

REVUO DE REVUOJ

Ĉu esperantistaj gepatroj *„verdigu"* siajn etulojn? Aŭ ĉu estus prefere lasi ilin mem decidi – iam – pri lernado de Eo? Vere interesa problemo, neniel malgrava. KONTAKTO, tiu serioza junulara (tamen ne nur porjunulara) revuo sukcese trafis familian aferon, kiam ĝi lanĉis tiun diskuton pere de diversopiniaj artikoloj. Ĝenerale staras super dubo la pedagogiaj avantaĝoj en etaj aĝoj pro dulingvismo de la infano. Tion ankaŭ Giorgio *Silfer* demonstris elegante surbaze de enketoj ne-esperantistaj. Sed kiel dulingvigi la gefilojn de la familio? Mi scivole atendas la alparolojn, precipe de tiuj, kiuj povas sin bazi sur propraj spertoj, estante gepatroj aŭ idoj de E-aj familioj.

La dulingveco per Eo enestas kompreneble en niaj celoj, kio nuntempe prezentiĝas kiel *kultura afero* por la plimulto de nia tendaro. En BRITA ESPERANTISTO William *Auld* deduktas jenon tiurilate: „Nia movado estas fakte plenplena de kulturitaj homoj . . . kiuj lernis ĝian kulturon". Oni devas atribui fortan gravecon al tiu konstato! En la ampleksa kaj ekscita interparolo kun Reinhard *Haupenthal* li emfazas plue, ke ĝuste tio helpas al Eo „elteni ĝis la historio trudos ĝin al la homaro". Tiaj reformoj „bezonas ofte multe pli ol unu-du vivlongojn por efektiviĝi", kion la movadanoj devas konscii kun pacienco.

Por havi ideon *pri nia* kulturo, nuntempa observanto povas konkludojn tiri el la nuna aro de eldonaĵoj E-aj. Krom la kvanta grandiĝo kompare al antaŭaj jardekoj, estas rimarkebla ia specifa trajto: reeldonoj de gravaj, famaj volumoj de la pasinto. Oni memoru la fotoofsetitajn jarkolektojn de LITERATURA MONDO, la Zamenhofan verkaron, kaj post multaj aliaj la baldaŭ – surprize – reeldonotan Enciklopedion de Esperanto (1933–4) La esperantista popolo – juna kaj maljuna – avide emas ŝtopi la breĉojn de siaj biblioteko kaj konoj. Tiun tendencon certe oni devas konsideri kiel fortikecon de nia movado, fenomenon ege pozitivan! Jen kaŭzo por firma pacienco! *Pilieroj* de movadoj estas la *kolonoj* de libroj – el ambaŭ vortoj mi forlasus ŝajnsufiksojn -er kaj -on, por ke ili ne malgrandigu la senton de firmeco . . .

La medalo havas tamen ankaŭ alian flankon. En HEROLDO pluraj pledas *pro nacilingvaj tradukoj* de E-aj literaturaĵoj. Vere prave! Kompreneble troviĝas tiaj. Ni ekscias, ke la tre fervora *Verloren van Themaat* – certe ne perdante de sia temo – publikis en nederlanda literatura revuo tradukojn de *Kalocsay* kaj *Ragnarsson,* aliaj poemoj en nederlanda traduko atendas eldoniston. En VILÁG ÉS NYELV (Mondo kaj Lingvo) aperis de nia Usona poeto, Julius *Balbin* emocia poemo „La Vorto" kiun konata hungara poeto, Károly *Jobbágy* tradukis hungaren. Pli kaj plu sur tiu vojo!

Pro sia graveco, kutime, la lingvo kaj lingvopolitiko staras je pinto de niaj aferoj, same en la revuoj – apud la movadaj rubrikoj. Eble nur hazarde, nun apenaŭ montris sin menciinda artikolo pri lingvaj aferoj. Mi ne koleras pro tio, kvankam persone mi ŝatas ĉi temon. La paĝoj estas uzeblaj por literaturo, por aliaj interesaĵoj, do same utile. El STARTO ni ekscias, ke la nacia heroo de la ĉeĥa popolo, Julius *Fučik* estis grava simpatianto de Eo: li preparis romanon pri INTERHELPO, esperantista kooperativo de ĈeĥoslovakiaJ laboruloj, migrintaj al Soveta Turkmenistano en 1925, por tie helpi la teknikizon. Ni vidos baldaŭ E-lingvan eldonon de sia fama „Raporto" el la nazi-prizono.

Eminenta studaĵo estas legebla (eĉ studebla) de Bernard *Golden* en SENNACIECA REVUO. Ĝi traktas la arton de la paleolitiko, esploras el la plej diversaj aspektoj ĝian signifon, serĉas la kialojn pri ĝia estiĝo. Per vasta scio pri la artrestaĵoj kaj pri la modernaj interpretadoj, Golden firmmane kondukas tra la apenaŭ konata tereno, kie kunfandiĝas etnografio kaj prahistorio, psikologio kaj zoologio, magio, totemismo kaj modernaj sciencaj teknikoj. Utiligante ĉiun ĉi, la prahistoriistoj tamen alvenas nur al malfortaj hipotezoj; ja *la sentoj de prahistoria artisto* – antaŭ 10–20 mil jaroj! – troviĝas ekster la limoj de nia kompreneblo. Rekoni tiujn niajn limojn – emfazas la aŭtoro en sia altnivela skribaĵo – gravas por la estontaj esploroj, kiuj devos trovi la ligojn inter la paleolitikaj kaj pli postaj kulturoj. Superflue ŝajnas mencii: ekspliko kaj stilo plezurigas per sia eleganteco.

Averto el Oriento sonas al kelkiuj: LA ESPERO el Suda Koreo en gvidartikolo atentigas pri riskoj de Eŭropeca uzado de Eo far Eŭropanoj. Azianoj ne emas aldoni al nia vortaro orientecajn vortojn laŭ sia gusto! Male, Eŭropanoj ofte ne hezitas malfaciligi la IL-on per „okcidentaj" esprimoj, simple ĉar tiuj staras proksime al la hejma idiomo, anstataŭ elekti konvenajn helpe de nia derivsistemo. Ili ne sentas la malfacilecon, kiun Azianoj renkontas lernante nian lingvon, kiu gramatike kaj vortare (ofte eĉ pro la fremda aboco) estas *malfamiliara por ili.* Tiuj argumentoj ne estas refuteblaj! Kvankam Eo estas la plej facile lernebla el-inter la fremdaj lingvoj, oni devas atente gardi tiun lokon, kaj senpripense, neglekte ne ŝarĝi superflue per „eŭropismoj" la Internacian Lingvon, tiun trezoron.

LITERATURA FOIRO elpaŝis per aparte interesa numero (54.) – almenaŭ por lingvoamatoroj. *Volapük* centjara – jen datreveno, kiun esperantistoj ne rajtas preterlasi. Nekonataj faktoj, movadhistoriaj aferoj, hodiaŭ jam komikaj fragmentoj el Volapük-gazetoj venis antaŭen pere de sindonaj esploroj. Claude *Gacond,* Tazio *Carlevaro,* Bernard *Golden* kun la redaktoro Giorgio *Silfer,* la stabo de CDELI-arkivo faris vere bravan plenumon, studante la iaman konkuranton de Eo, por montri ambaŭ fenomenojn en pli klara lumo, kompreni ilin pli profunde.

La siatempe (1880.) sensacia sukceso de tiu internacia lingvo vaste disfamigis ties *ideon,* sed baldaŭ jam misfamigis ĝin. La nocio volapukaĵo mise konatiĝis tra la mondo, kaj igis la publikon skeptika. La naŭzo de niaj pioniroj rilate Volapükon montriĝas tute prava ankaŭ laŭ la modernaj esploroj. Niaj antaŭuloj sur la propra haŭto sentis la afekciajn kontraŭsentojn de la publiko, kiam ili propagandis Eon. Malfeliĉe por la afero de IL, V. antaŭis per kelkaj jaroj Eon, la veran solvon de ĉi tiu problemo: sur malfekundigita tereno, multe pli da energio necesis eĉ por vivteni ĝin, kaj kiom pli por prosperi ĝis nun! Tamen, nia granda batalo en tiu komparo eĉ pli reliefiĝas antaŭ niaj okuloj, la fortikeco de nia floranta arbo despli evidentiĝas. De diligentaj esploristoj ni ricevis tiun eblecon. Grave!

Necesis longa periodo por raporti tion: MOSCOW NEWS, granda semajngazeto jam la duan fojon aldonis *E-lingvan Suplementon* (nro 16/1979). Parolo antaŭ la balotantoj de prezidento *Brežnev* estis publikita (modela traduko meritas laŭdon); kaj abunda materialo, raportoj pri la delonge atendita *fonda konferenco* de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj. Jen tuja propaganda sukceso, aplaŭdinda.

Ervin *Fenyvesi*

Gábor Csontos

Naŭzaj tagoj

Fragmento el la dokument-romano
„Mi vagadas laŭ mia nazo"

1944, vintro: la venkita nazi-armeo retiriĝas en Transdanubio okcidenten. La ŝtatpotencon konkerintaj hungaraj faŝistoj, tn. sagkrucanoj rekrutigis eĉ la 15-jarajn knabojn. En la milita ĥaoso marŝas la knabo-trupoj mizere, apenaŭ provizite; dume du gimnazianoj sukcesas fuĝi de la trupo . . .

. . . Laĉjo kaj mi finfine distanciĝas de niaj oficiroj. Malantaŭ la vilaĝo ni trovas la fervojstacion. Longa vartrajno kuŝas sur la reloj, maljuna fervojisto nur murmure alĵetas: ĝi parkas tie jam depost tagoj, surblovita neĝo baras la trakon . . . eble vespere la trajno ekveturos, scias la diablo . . . Malantaŭ la lokomotivo ni okupas bremsbudon de vagono, almenaŭ ni ne frostas ĝisoste ene de ĉi eta ejo. Siblas glacia vento tra breĉoj, enŝprucas polvoneĝon. Iom post iom la neĝo jam kovras la ŝuojn. Kiam post horo startas la trajno, pro frosto ni eksuferas.

Laĉjo ekmemoras, li havas ja kovrilon en la dorssako. Mi alkrias ĝojplene: – Kreteno! Nur nun vi elsputas tion?

Dum momentoj ni enkovriĝas plejeble. Niaj kapoj kaj brakoj apudas, tiel ni varmigas nin, sed la piedoj devas suferi. Ni frostas tial, meditas Laĉjo, ĉar la trajno multe haltas, se ni veturus, ni ne pensus pri la malvarmo. Bah! Tiam eĉ pli akre tranĉus la vento. Dum longa stagnado ni singarde elrigardas. Nokto, nenia lumo, nek ia homa voĉo. Nur la lokomotivo ek-ekronkas. Poste starto, nova paŭzo, ree starto.

Ni forlasas denove du staciojn. Abrupte puŝas forta bremsado, skuiĝas radoj kaj grincas, ĝis ekhalto. Aŭdiĝas kuraj paŝoj.

– Ĉu vi vekiĝis? – mi demandas.

– Ne! Mi dormas.

– Aĉulo, neniam vi kapablas normale respondi – mi koleras, kaj puŝetas pordon iom elrigardi. Tuj reen, sed jam malfrue. Lumo frapas niajn okulojn, nenion vidante, nur la voĉon mi aŭdas: – Descendu!

Ni descendas. Lampoj kuradas preter la longa trajno, oni antaŭenigas homojn. Ankaŭ nin oni irigas puŝante. Kvazaŭ sinkanta en la malhelon, eta stacio ŝajnas tute forlasita. Sed en la atendejo atendas armitaj viroj. La trajno forbruas, kaj ni dekope restas inter la ses armitoj.

– Ekiru! – diras unu, la aliaj parolas germane inter si. Du havas sagkrucanan uniformon, la vibrantaj poŝlampetoj eklumas ilin. La ceteraj nur civilveste, sed ĉiuj portas brakrubandon kun sagokruco. Inter mallumaj domoj oni eskortas nin, sur unu tamen videblas interna lumo desub fenestro-kovriloj. Tien ni eniras. Germane sonas: gardistoj restu kun la kaptitoj!

Interne sagkrucano sidas malantaŭ tablo, blindige brila lampo versas lumon sur nin. „Ĉu la ĝentlemanoj havas ian legitimilon, eventuale pri heroaĵo?" – ridaĉas la viro. Atendo. „Do, ne! Eskortu kaj enŝlosu tiujn dizertantojn ĝis transportado!"

Enpuŝitaj en malluman ĉambron, ĉiuj palpante klopodas preni konvenan lokon por si. Poste ni provas ekdormi . . . Je krepusko mi vekiĝas je ploro. Heliĝas, mia dormemo ĉesas, sed ne la plorado el la angulo. Knabon konsolas alia knabo. Laĉjo jam vekiĝis, aliras kaj prezentas cigaredon.

– Li ne fumas, mia frateto, li estas nur dekkvar-jara – klarigas la pliaĝa – sed mi akceptas danke. La aliaj ankoraŭ dormas: du viroj en soldatpantalono kaj civila jako, nu, evidente ili estas dizertintaj soldatoj. Mi vidas du rekrutitajn lernantojn en bonaj civilvestoj, krome kamparane vestitan viron, kape bandaĝitan, en soldataj ŝuoj, do ankaŭ tiu mizerulo estas kaptita.

Matene oni pelas en la ĉambron ankoraŭ dudekon da knaboj. Same rekrutitaj kiel ni, ili diras, ke ili kune dizertis kaj intencis ankaŭ komune atingi ie la fronton por „transgliti". Ne daŭre ni interpremiĝas en tiu kameraĉo, ĉar oni eligas nin, kaj pelas internen de ŝarĝaŭtoj. Antaŭe du sagkrucanoj, malantaŭe du, tiel ni ekveturas, por fariĝi novaj taĉmentoj de la milito . . .

Landvojo glacia, la neĝon veturiloj distretis jam. La aŭto glitas, skuadas nin, nia direkto videblas bone tra la truoj, la okcidentaj montoj atendas . . . Oni haltigas nin antaŭ urbeto pro flugalarmo, sed ni evite ĉirkaŭiras la urbeton sur terure animskuaj vojoj. Apenaŭ atingante la largan ĉefŝoseon denove, aperas supre aviadiloj. La sagkrucanoj komike etendas kolon, rigardemas ĉiudirekten, kaj subite iu ekkrias vulturvoĉe:

– Flugo! Halt'! Aviadilo!

Dum momento turnas, bremsas la veturilo, unue la sagistoj hastas en la apudvojan arbaron, sed ankaŭ niaj kruroj rapidas. Malalte jam zumas aviadilo, knaras ĝia maŝinpafilo, unu sagkrucano veas. Laĉjo kaj mi kuregas sur la neĝo, ronke spiras, sed malkuŝas, ni sampensas: forvaporiĝi de tie! Kuro, kurado plu, mi helpe tiras jam lin, prenas lian dorsosakon. La flugmaŝino returniĝis, granda kriado denove, sed ni malproksimiĝas jam de la ŝoseo.

Ni devas iri supren laŭ la deklivo, pli kaj pli supren, inter arboj, ĉie arbaro. Kiam iĝas pli krute, Laĉjo brakpremas, kaptas arbon:

– Aŭdu, haltu! ni ne trovos eliron de tie . . .

– Nu tamen – mi esperigas lin. – Transironte la monton certe ni ne frapiĝos inter ilin.

– Kial ne? – grandokule li demandas.

– Ĉar malantaŭ ĉiu monto troviĝas alia vojo.

Laĉjo sufere ridaĉas, lia grimaco montras egan laciĝon. – Lasu min krevi, mi mortaĉos, lasu! diablon! – li stertoras kaj falas teren. Mi alsaltas, provas lin levi.

– Putru la mondo! Aŭdu, putriĝu ĉiu, sagkrucanoj, milito, krevu ĉiuj!

Mi ekkompatas lin. Dekses-jara, li, kiun milito elpuŝis el la varma familia nesto, li, persekutata, celo de pafiloj, pelata sur neĝo, dormanta sur pajlo – kvankam li devus en lerneja benko sidi, parkeri latinaĵon, gravuri benkon . . . Kaj anstataŭ tio gire li rampas en malhela arbaro, skrapas neĝon kaj furioze hurlas.

Mi sidiĝas sur trunko, kaj malvole ekploras freneze, malkapabla fari alion ajn. Bedaŭrante Laĉjon miaj pensoj celas nur lin, tamen mi eksentas, ke mi ege maltrankviliĝas ankaŭ pri mi mem, terure mi timas, jam min mem bedaŭras. Ploregante mi singultas, tremegas tutkorpe, amara salivo en mia buŝo, vomemo ekas.

Mizeraĉa mondo . . .! Fi! Je Kristnasko mi vomas en nigra arbaro ie, kiel malsana besto kiun neniu akceptus tranokti . . . Mi simple frostiĝos, ĉi tie malaperos sub la neĝo, nenio mi iĝos, kune kun mia Laĉjo. Antaŭ jaro mi ankoraŭ esperis plenumi la abiturientan ekzamenon, poste sidiĝi malantaŭ ia oficeja skribtablo kiel mia patro, skribi, skribaĉi. Eblas, ke foje mi deziris esti piloto, aŭ iĝi ŝipmaŝinisto, negrave, *io mi volis fariĝi* kaj anstataŭ tiuj kio mi fariĝis? Merdo en neĝo, frostita, la neniaĵo mem, kiu atingis la nenion, nur tio estas mia tuta vivo . . .

Mi eksentas, ke Laĉjo genusidas apud mi, kaj ploras simile. Sian varman, humidan vizaĝon li premas al la mia, balbutas iom, kaj alkroĉas sin al mi tiel, kvazaŭ neniam li forlasus min. Ne baldaŭ ĉesas singulti nia plorado, iom honteme ni ekstaras, defrapas la neĝon. Ne frostiĝi! Jes, kial ni frostiĝu? Ni devas ekiri ĉefe por ne frostiĝi, ankaŭ por fuĝi de niaj persekutantoj, ni devas marŝi por eviti aliajn ninĉasantojn. Ni devas pluiri, eble, eble ni renkontos tiun, la solan honestulon, kiu savos nin . . .

Dentgrincante, spiregante ni rampas, grimpas, ambaŭflanken skuiĝas ebrie de timego, erarvage tra montoj, valoj, evitante vojon, homan ejon, ni vagadas en nebulo, en neĝfalo, marŝas ĉar malkuraĝas fari alion. Trinkas neĝon, manĝas neĝon, niaj korpoj jam senforte . . . jes ja, ni devas ankoraŭ serĉi la solan honestulon, kiu emas savi nin, mi bal-balbut-tas, kiam vojo ekŝajnas antaŭ ni.

– Kio ajn okazos, mi tamen suriros ĝin – diras Laĉjo, kaj alpaŝas. Antaŭe ne travidebla neĝfalo, griza nebulaĵo da flokoj. Homa figuro montriĝas, iu oficiro. Ili brakumas! Mi alvenas, kaj ekkonas lin, onklon Tulipan . . .

Trad. Ervin *Fenyvesi*

István Nemere

NUDELO KUN MARMELADO

B.V., dudekokjara teknikisto la 16-an de aprilo 197 . . . divenis, ke li kapablas flugi.

B.V. samtage faris sian unuan, ĉirkaŭ okdekmetran flugon. Li flugis paralele kun la surfaco de la tero, ĉirkaŭ kvar metrojn alte, sen ia ajn frapmovo per brakoj aŭ piedoj. Li staris en la aero iom antaŭenklinigante, rigide, kaj dume la regiono preterflugis sub li.

Poste B.V. hejmeniris kaj vespermanĝis. Li manĝis frankfurtan supon kaj nudelojn kun multe da abrikotmarmelado. B.V. ŝatis la abrikotmarmeladon.

Lia edzino – naskiĝnome K.I. –, dudekkvarjara fabrika laboristino, rakontis pri la najbaroj kaj sia brigadestro, naŭza porko. B.V. apenaŭ aŭskultis. Post vespermanĝo li kuŝiĝis, lia dormo estis mallonga, sed trankvila. Matene lin vekis la horloĝa sonorilo.

Posttagmeze li traflugis super la riverbordo. Du maljunulinoj ekvidante lin faris signon de kruco. Triatage B.V. preskaŭ kvincent metrojn flugis sen alteriĝo.

Dimanĉe li ekskursis kun la edzino; ili devis aerumi la pulmojn post semajno pasigita en mucida subluita ĉambro. B.V. en momento konvena kliniĝis antaŭen, eksaltis kaj suprenflugis. Lia edzino longe ne rimarkis, kien li iris. B.V. multfoje krozis super ŝi, poste alteriĝis apud ŝi sur senarbejo. „Kie vi erarvagadas, je diablo" – ŝi murmuris kaj elpakis la kunportitan tagmanĝon.

Ekde tiam B.V. ĉiam pli multe flugis. Iom post iom la homoj en ilia strato komencis flustradi pri li. Kvankam en la urbo – pro la elektraj dratoj – neniam li flugadis. Nur malofte, super la rivero, kampoj kaj la ĉevalkurejo.

Iutage oni alvokis lin al policejo kaj pridemandadis. Sed liaj flugoj al neniu malhelpis, do oni lasis lin libera. Foje en la fabriko, telefonis al li la pordisto. Alvenis ĵurnalisto: „Oni rakontis al mi, ke vi kapablas flugi" – li diris moke kaj jene daŭrigis: „Nu, konfesu, kiom vi trinkas tage?" B.V. senvorte turnis sin, rigardon ĵetis supren, ĉu ne estas ie elektraj kabloj, kaj . . . leviĝis. Li rondflugis, la ĵurnalisto staris kun malfermita buŝo. B.V. jam ne revenis al li; li descendis sur tegmenton de nova muntaĵhalego, subiĝis sur la ŝtuparo de fajrobrigadistoj kaj silenteme reiris al sia laboro.

Iuvespere B.V. flugadis super la ĉevalvetkurejo. Estis vendredo, la ĵokeoj ĝuste finis la trejnadon. Poste ili kolektiĝis ĉe la rando de l'kurejo kaj pritraktis, kiu el ili venkos dum sekvontdimanĉa vetkuro. Ili ne rimarkis la teknikiston senbrue rondflugantan super iliaj kapoj. B.V. aŭdis ĉiujn vortojn.

Dimanĉe li iris kun la edzino, kaj vetis je la plej malmultŝanca ĉevalo. Ĉiuj lin priridis. Ĝis la fino de tiu vetkuro. Tiam B.V. aliris la kason kaj enpoŝigis kelkajn dekmilojn.

Ĉiuvendrede B.V. flugadis super la vetkurejo, kaj ĉiudimanĉe li gajnis. Post du monatoj ili aĉetis loĝejon, meblojn, aŭtomobilon.

Iun aŭtunan tagon B.V. elveturis el la urbo per sia komforta aŭto. Li ekkomprenis ke li havas jam ĉion: belan loĝejon, edzinon, aŭtomobilon. Konscie li sidis malantaŭ la direktilo. Ĉe rando de arbaro li bremsis. Neniu estis proksime. Li elaŭtiĝis, flaris la venton, poste malrapide li antaŭenkliniĝis, koncentris . . . Liaj piedoj ne disiĝis de la tero.

B.V. ĉirkaŭrigardis. Denove li provis, sed ĉi-okaze same li malsukcesis. Kaj li komprenis: neniam plu li kapablos flugi.

Li tiris sian ŝultron kaj residiĝis en la aŭtomobilon. Li hejmenveturis. La vespermanĝo konsistis el frankfurta supo kaj nudeloj kun multege da abrikotmarmelado. B.V. tre ŝatis la abrikotmarmeladon.

D-ro Ferenc László

La rolo de akvomastrumaj kompanioj en la hungara akvomastrumado

La luktado por kaj kontraŭ la akvo – do la akvomastrumado – ĉie sur la Tero havas grandan rolon. Tiel estas ankaŭ en Hungario. En nia lando en vico de la ŝtataj taskoj okupas aparte gravan pozicion kaj la ŝirmado kontraŭ la akvaj damaĝoj, kaj la akvo-utiligo. Konforme al la postuloj de la rapida socia-ekonomia progreso, partoprenante en la vivnivel-politiko, la pli moderna kaj kompleksa akvomastrumado movas jam de jardekoj grandajn fortojn, postulas altajn plenumojn, kaj venonte ĝi strebos pli kaj pli grandajn celojn realigi.

La kreo de unueca ŝtata hidrologia organizo en 1948 alportis favoran turnon en la hungara akvomastrumado. Tio montriĝis ne nur en pli bona organizado de akvolaboroj, en ties plia teknika nivelo, sed ankaŭ en la vere granda evoluo de la akvomastrumadaj instalaĵoj.

La ŝtato investas de jaro al jaro signifajn sumojn por hidrologiaj celoj, sed tiuj investadoj ne kapablas – ankaŭ venonte ne – tute solvi ĉiujn tiajn taskojn. Multobligi efikecon de lukto kontraŭ akvonocoj, plivastigi irigaciadon, akvoprovizadon, akceli kanalizacion, estas nur tiam plenumeblaj, se oni koncentras la ŝtatajn fortojn por evoluigi la baze gravajn akvajn konstruaĵojn, kaj se konekse al tiuj, la interesatoj kooperados por solvi – kun ŝtata helpo – la malpli gravajn, lokajn hidrologiajn taskojn.

La agraraj kooperativoj, ŝtataj bienoj, etbienuloj ĝenerale rekonis, ke ili ne povas pasive rigardi, kiel minacas la terprodukton jen akvonocoj, jen arideco[1], kvankam iliajn bienojn preteras la grundakvon forkondukaj kaj irigaciaj ĉefkanaloj faritaj de la ŝtato. La solvo prezentis sin mem: per loka kooperado *propraforte* ili devas konstrui la kanalbranĉojn al la ĉefkanaloj. Tiel estas forkondukeblaj la nocaj akvoj, igantaj malcerta la produktadon, kaj samtiel povas alveni irigacia akvo sur iliajn bienojn, rezultanta pli riĉan rikolton. Tiamaniere eblas pli ekonomie establi kaj funkciigi

Muntado de prefabrikita „hidroglobo" (akvo-turo)



irigaciajn virkojn[2], krome provizi per trinkakvo la vilaĝojn.

Tiujn lokajn fortojn mobilizas la tn. *akvomastrumaj kompanioj,* kiuj pruvis jam la taŭgecon kiel organizoj, brave plenumante diversajn lokajn taskojn de akvomastrumado. Post lokaj iniciatoj, la Prezidia Konsilio de nia lando fiksis per dekreto en 1957 la formojn, laŭ kiuj la interesatoj povas fondi tiajn kompaniojn por lokaj celoj. Tiaj celoj estas: efektivigi la akvomastrumadon de iu vilaĝo aŭ strikta regiono, per aktivado kaj financa kontribuo mem de la interesatoj, utiligante la apogon de la ŝtato.

Do unuflanke: la kompanioj prezentas formon por loka partoprenado en la landaj priakvaj farendaĵoj. Ilia dudekjara agado – la unuaj kompanioj de socialisma tipo ekfunkciis en 1958 – kaj la sekva daŭra prospero pruvis, ke tiu formo tute taŭgas, bonrezulte funkcias kaj plenumas signifajn taskojn. La kompanioj havis gravan rolon, ankaŭ plu, en establo de la teritoria sistemo de akvomastrumado, kaj forte pliigas ties efikecon.

Aliflanke: la kompanioj per sia agado unuigas la ŝtatajn celojn kaj la lokajn interesojn pri la hidrologia mastrumado. Ili estas komune mastrumantaj organizoj de bienhavantoj, ŝtataj, kooperativaj kaj familiaj mastrumoj, en iu ĉirkaŭaĵo aŭ eta regiono, kiu formas geografian, naturan komplekson el vidpunkto hidrologia, bezonanta unuecan provizadon.

Tiuj aŭtonomaj organizoj, tamen respektantaj la tutlandajn interesojn, jam en la unuaj jaroj atingis signifajn rezultojn. En 1960 jam sur 1,6 milionoj da hektaroj funkciis kompanioj, kiuj per siaj trijaraj agadoj igis la produktadon pli sekura sur 460 mil ha. Tio estas des pli menciinda, ĉar la kompanian laboron iom malfaciligis la tiutempe ankoraŭ multaj etbienoj, kiuj konsistigis pli ol 70%-ojn de la kompaniaj teritorioj. Ĝuste tial la kompania agado tiutempe celis unuavice anticipi la akvodamaĝojn, kiuj grave malhelpis ankaŭ la etbienulojn.

La hidrologiaj kompanioj havas grandan tradicion en Hungario. Por efike kaj sisteme ŝirmi sin kontraŭ la ofte ripetiĝantaj inundoj, la loĝantaro – jam komence de la deknaŭa jarcento – kuniĝis en kompanioj kontraŭinundaj kaj grundakvojn reguligaj. La elspezojn por konstruado kaj prizorgado de la pumpilejoj, kanaloj, riveretoj ktp. la kompanioj kovris el regulaj, kvazaŭ-impostaj kontribuaĵoj de la ŝirmita loĝantaro. Dum jarcenta ekzisto tiuj kompanioj sen-



Maŝinejo de vilaĝa, etmezura akvo-distribuejo

akvigis areojn de 2,5 milionoj ha, konstruis pr. 4000 km da kontraŭinundaj digoj, kaj 20 mil km da kanaloj. Post la grandaj inundoj en 1867 kaj 1876, k.a., plievidentiĝis la graveco de la kompanioj. Tion rekonis ankaŭ leĝoj kaj dekretoj. Por unuecigi la agadon de la kontraŭinundaj kompanioj estis kreita la unua akvojura leĝo en 1885. Tiu grava paŝo jam ebligis al la kompanioj ankaŭ la sisteman akvoutiligon.

Laŭ statutoj de tiuj „iamaj" kompanioj, la taskoj estis ĝenerale la jenaj:

– seninundigo de siaj areoj,
– reguligo de grundakvoj,
– utiligo de akvoj,
– prizorgo kaj funkciigo de siaj akvaj virkoj.

La kompanianoj estis tiuj, kiuj havis bienon en la agadsfero de la kompanio.

Post restarigo de la damaĝoj kaŭzitaj de la dua mondmilito, oni daŭrigis la hidrologian agadon, kies plej granda parto ŝarĝis la tiamajn kompaniojn. Kvankam ili plenumis multajn necesajn kaj gravajn taskojn, ne estis taŭgaj inter la novaj cirkonstancoj sekvi la ŝanĝiĝintajn bezonojn de akvomastrumado. Pro lokaj interesoj tro ofte neglektiĝis teknike ĝustaj, por la lando pli valoraj solveblecoj. Tiel montriĝis malkapablo de tiaj kompanioj por oportune akordigi lokajn bezonojn kun socialisma, laŭplana progreso.

La novtipaj akvomastrumaj kompanioj iĝis gravaj kompletigantoj de la ŝtata akvomastrumado. La ŝtato donas subtenon, precipe tien, kie montriĝas iniciato kaj loka aktiveco, mobilizo de lokaj fortoj flanke de la interesatoj.

La celoj de fondindaj kompanioj povas esti tre diversaj: reguligo de lokaj akvofluoj, de grundakvoj, senakvigo de kampoj kaj paŝtejoj, zorgado pri someraj ŝirmdigoj, kontraŭeroziaj virkoj; konstruo kaj funkciigo de lokaj instalaĵoj por irigacio, por trinkakvo aŭ kanalizacio, ks. Kompreneble la formo de iu kompanio estas ĉiam laŭcele elektebla, do la plej konvena.

La granduzinoj, ene de la akvomastrumaj kompanioj, kooperas por tiaj taskoj, kiujn ili aparte ne, aŭ nur per troaj kostoj povus realigi. Tia kooperado ebligas unuecan akvomastrumadon por iu baseno aŭ irigacio-sistemo, kaj tiamaniere ĝi estas kaj teknike, kaj ekonomie pli celtrafa.

La ŝtato establos ankaŭ plu la lande signifajn akvomastrumajn instalaĵojn, la kontraŭinundajn kaj riverreguligajn virkojn, la grandajn kanalojn por irigacio aŭ grundakvo-forkonduko. La lokajn hidrologiajn konstruadojn la granduzinoj devas unuavice per siaj kunigitaj fortoj efektivigi, helpe de grava ŝtata subteno teknika kaj financa.

La signifon de la kompanioj elokvente montras, ke antaŭ ilia ekagado apenaŭ ekzistis sistema loka akvoreguligo. Se foje, sur tereno de iu uzino aŭ komunumo okazis io simila, tio devenis el ŝtataj spezoj, sen partopreno de lokaj fortoj. La sekvo estis kompreneble malrapida kaj nesufiĉa progreso, kio certagrade klarigas la tiam

Higiena trinkakvo por la vilaĝo

fortan kreskon de la akvonocoj.

Pere de la kompaniaj laboroj nun efektiviĝas la taskoj de interesatoj pri akvo-reguligo kaj -utiligo. Ankaŭ la grandaj akvoinstalaĵoj, la ŝtate direktitaj laboroj iĝas pli efikaj. La lastgradaj akvo-virkoj malpliigas la stagnantajn akvojn, kreskas la daŭra utiligo de la ŝtate konstruitaj kaj prizorgataj kanaloj kaj de ties irigacia akvomaso. Tiel interrilatas kaj kompletigas sin la hidrologiaj laboroj de ŝtato kaj de kompanioj.

„Akvomastruma kompanio" estas komuna nomo, depende de la celoj ĝi havas du formojn: t.e. akvo-kompanio kaj kompanio por komunumaj akvoservoj.

La akvo-kompanio

La akvo-kompanioj servas unuavice la akvomastrumadon de kultivitaj agroj. Oni reguligas akvojn, zorgas pri teknika grundŝirmado kaj pri agrara akvoutiligo (irigacio). Krom komuninteresaj taskoj ili plenumas sur sia teritorio hidrologiajn laborojn ankaŭ por kooperativoj, ŝtataj bienoj, uzinoj kaj bienuloj. Tiu speco de kompanio investas kaj plenumas kiel teknika-ekonomika organizo, kiu mem funkciigas kaj prizorgas la kreitajn publikcelajn instalaĵojn. Tiucele ĝi disponas pri stabilaj personaro kaj ekipaĵo.

La agado de la akvo-kompanioj servas plejparte favore al la akvo-cirkonstancoj sur areoj de la agraraj granduzinoj, do la rilatoj kun tiuj estas aparte striktaj.

La industria kaj komunuma progreso, la kresko de la tn. „infrastrukturaj" investaĵoj bezonas nepre plian spacon, pro kio la agrokulturo reduktiĝas al malvastiĝanta areo. Ĝuste tial havas grandan signifon ĉiuj agadoj, kiuj daŭre kaj efike levas la fekundecon de grundo, kaj repuŝas la nekonvenajn efikojn de naturfaktoroj je la kreskaĵoj.

Inter tiuj agadoj ni mencias la tn. *melioracion*, kiu estas komplekso de tiaj hidrologiaj, teknikaj, biologiaj, fizikaj kaj agroteknikaj intervenoj, per kiuj la produktivo de grundo estas levebla. Grava kriterio por la melioracio estas la daŭreco de ĝiaj rezultoj; necese do la melioraciajn taskojn – inkluzive la hidrologiajn – kunagordante plenumi, tute komplekse.

Inter tiuj taskoj precipe gravas sur niaj *ebenaj* pejzaĝoj la reguligoj de grundakvoj, por preventi la nocojn pro precipitaĵaj akvoj.

Estas inde mencii pri laboroj de akvo-kompanioj en *montaj* kaj *montetaj* pejzaĝoj por akvoreguligo kaj grundŝirmado, ĉar tiuj havas egan gravecon. Sur deklivoj defluantaj akvoj erozias en nia lando jare minumume 50 milionojn m^3 da fekunda grundo, kies organike riĉa parto estas taksebla je 35–40 milionoj da tunoj, en valoro de 5–600 milionoj da forintoj. La detruon de fekunda grundo sekvas plia damaĝo: ties sedimentiĝo en kuŝejoj de kanaloj kaj fluoj, jare ĉ. 10 milionoj m^3.

En niaj altaj pejzaĝoj la precipitaĵojn retenas plej nature la grundŝirma terkultivado, kiu celas igi plejeble minimuma la surfacan defluadon – parte por malhelpi grundan erozion, parte por konservi la precipitaĵon en la grundo. Ĉesigante la grunderozion, eblas haltigi la ĝis nun rapidan detruiĝon de tiu nemalhavebla landa trezoro, eĉ oni povas ekigi procezon por iĝi humo. Pere de enpenetrigo de precipitaj-akvoj kreskas la akvomaso, nepre necesa por kultivado sur deklivoj. (Ĉiu kg da planto-sekmaterialo bezonas dum kreskado po 300–500 litrojn da akvo.)

Rezulte ni devas emfazi, ke la grundŝirma terkultivado funde rilatas al plua formado de la landa akvoreguligado. Ju pli perfekte estas ŝirmataj la deklivaj grundoj, des pli da akvo restas surloke ene de la grundo. Per plia akvo kreskas pli amasa vegetaĵo, kiu pli bone kovras kaj defendas la

Moderna akvo-turo



Multiĝas la irigaciaj kanaloj liverantaj vivigan akvon

grundon. La sedimentado malmultiĝas, kaj alvenonte al la fluejoj tiel malpli ŝlimiĝas. Ĉe riveretoj malpli ŝanceliĝos la akvokvanto kaj nivelo. Sinkas la kostoj por akvoreguligo kaj en altaj, kaj en ebenaj pejzaĝoj, same tiuj por fluejkonservado.

La grundŝirmado estas komplemento al la sistema akvoreguligo; tial la reguligo de akvofluoj kaj la kampajn defluaĵojn forkondukanta kanalizacio estas premisoj por atingi efikan grundŝirmadon kaj melioracion de grundoj.

La hidrologiaj, agronomiaj kaj agroteknikaj interrilatoj de grundŝirmado kaj akvoreguligado tiel resumeblas:

– granda procento da surdekliva precipitaĵo defluas, ĉar la gravito-komponento pli validiĝas ol la englutivo de grundo, kiu ĉe arbar-devenaj montetaj grundoj estas denature nur etgrada;

– la surdeklive defluanta akvo kuntrenas pli-malpli da grundo , depende de dekliva angulo kaj longo, speco de grundo, kovriteco, kultivmaniero kaj akvomaso;

– tiun ĉi kuntrenaĵon la akvo deponas – depende de la menciitaj faktoroj – diversloke sur la deklivo, aŭ forportas al fluujoj, eĉ ĝis malproksimaj regionoj, eventuale, okaze de granda volumeno, alte sedimentigas fluujojn.

La sekvoj de tiuj procezoj por la agroj:

– pro la denudiĝo la humo kaj la mineralaj koloidoj de la grundo malriĉiĝas (tn. adsorba komplekso);

– perdiĝas nutro-substancoj el la grundo, kaj en forte ligitaj, kaj en facile solveblaj frakcioj;

– pro dekadenco de vivkondiĉoj malmultiĝas la *„edafono"* (viva fazo, vegeta parto de grundo), kaj pro tio ankaŭ la humiĝo, grundo-diseriĝo, nutraĵ-malkomponado kaj asimilado, ktp.;

– la ĉenreakcio estas akcelanta: la malrapida grundiĝo postrestas al la neniiĝo de la grundsuperaĵo, tiel la produktivo de grundo akcele malpliiĝas, ekstremkaze ĝis plena malproduktivo (v. Monto *Sas* en Buda, aŭ orienta Mediteraneo, *Levanto*).

Prezentas sin kromaj nocaj efikoj:

– forlavo de plantoj, damaĝoj pro ties kovro per deponaĵoj,

– damaĝoj de trafika reto,

– damaĝoj ĉe komunumaj servoj,

– ŝlimiĝo de fluejoj.

En pejzaĝoj montaj kaj montetaj – kiel montrite – la grundŝirma agado estas strikte ligita al la akvoreguligado, sekve bona rezulto estas atendebla nur per iliaj agorditaj teknikaj, resp. agroteknikaj laboroj.

La erozio koncernas kvaronon de la agrokultura areo de nia lando. La jare perdiĝanta kvanto de fekunda grundo – 50 milionoj m^3 – estas malpliigebla je la kvarono, pere de kompleksaj baseno-reguligoj, krome kvinono de la meza jara precipitaĵo estas surloke retenebla. Pro grundo-detruiĝo la rikoltperdo de la popolekonomio atingas 30%, t.e. pli ol 2 miliardojn Ft.

Estas pruvite, ke pro ne laŭfaka mastrumado la grunda produktiveco kun la tempopaso akceliĝante dekadencas, ekstremokaze eĉ ĝis malfekundeco, ĉar la grundo-detruiĝo superas la grundo-kreiĝon. La grundŝirmado haltigas tiun procedon, eliminas aŭ malpliigas la denudadon tiom, ke la grundo-kreiĝo egalos ĝin. La produktiveco restos la sama sen plia elspezo, do ĝi servos stabila bazo por agrokulturo. Tie la investado ne necesas por kontraŭpezi la falon de produktiveco, sed ĝi estas utiligebla por pliampleksigi la produktadon.

Apud la supraj restas grava parto de melioraciaj farendoj la irigaciakvoprovizado fare de akvomastrumaj kompanioj – precipe por la optimuma akvo-havaĵo de la grundo. En 1975 la kompanioj sur pr. 100 mil ha funkciigis irigacion, signife kontribuante tiel al la agrokultura produkto-kresko.

Konvinkaj nombroj

Inter 1958 kaj 1975 la kompanioj konstruis, resp. rekonstruis kanalojn kaj etfluejojn en longeco de 51 mil km, movante 111 milionojn m^3 da tero.

Dum la du jardekoj depost sia fondo, la akvo-kompanioj plenumis per produktado/priservado pli ol 10 miliardan valoron. Komence tiu laboro atingis jare nur kelkmilionojn, kion klarigas ilia tiutempe ankoraŭ ne sufiĉa aparato. Post 1966 la hidrologian agadon akcelantaj registaraj disponoj favore prosperigis la komuncelajn investadojn, kaj la ĉefajn, kaj la loksignifajn.

Rezulte de ampleksigo de ilia aparato, kaj pro la kreskinta bezono je laboro de la kompanioj, ties produkto-valoro altiĝis de jaro al jaro. Komence de la IIIa kvinjarplano, en 1966 ĝi estis pr. 300 milionoj Ft, lastjare (1970) superis la 700 milionojn; forte plialtiĝis dum la IVa kvinjarplano, atingante en ties lasta jaro (1975) jam la 1,2 miliardojn Ft.

Kompanioj por komunuma akvoservo

La kompanioj por akvoprovizado kaj por kanalizacio havas rolon precipe ĉe efektivigo de la programo pri vilaĝaj komunumaj servoj, sed ankaŭ ĉe evoluigo de ripozej-regionoj.

La komunumaj servoj kaj instalaĵoj servas ja kiel bazo por civilizita, sana kaj komforta kunloĝado. Precipe la

provizado per akvo havas egan rolon por levi sur pli altan ŝtupon la cirkonstancojn de la loĝantaro. Anstataŭ fositaj putoj, donantaj malabunde, ofte ne higienan akvon, la moderna loĝado nepre bezonas provizon per kondukita akvo; jen aparte grava faktoro por altigi vilaĝan vivnivelon, malpliigi distancon inter vivmanieroj de vilaĝoj kaj urboj.

La postresto de akvoprovizado ĉe la vilaĝanaro estas misa heredaĵo de la pasinto. Jam okazis tre multe por tion likvidi, tamen restis ankoraŭ abunde da farendaĵoj. La kompanioj por komunumaj akvoservoj brave plenumis tiurilate multon, kaj ankaŭ venonte ili devos forte evoluigi la provizon de vilaĝoj kaj urbetoj per moderna akvokonduko kaj kanalizacio. La pli ol 800 novtipaj kompanioj – kreitaj ĝis 1975 – ĝis nun konstruis pr. 600 akvodistribuejojn, transdoninte tiujn al la komunumoj por funkciigo. Tiamaniere pli ol 2 milionoj da vilaĝanoj akiris kondukitan, higienan kaj pli abundan akvon.

El la menciitaj jam videblas, ke ĉefe pro la kompanioj rezultis la forta altiĝo de komunuma akvoprovizado por la vilaĝanaro, de 8% en 1961, al ĉ. 50% hodiaŭ.

La rapidiĝintan provizadon de la vilaĝa loĝantaro per kondukita akvo montras la tabelo laŭ departementoj:

„Artefarita pluvo" estingas soifon de la grundo

Konsiderinda rezulto estas, ke en la plej gravaj – tn. preferataj – ripozej-regionoj (apud lagoj Balatono, *Velencei-tó,* Danubkurbo) ĝis nun plurcento da km de akvokondukilo estis konstruita pere de kompanioj. Dum la nuna kvinjarplano (1976–80) oni antaŭvidas konstruadon de 250–300 komunumservaj akvo-instalaĵoj kaj komunuman akvoprovizadon por pluaj 650–700 mil loĝantoj.

Departemento	Sumo de vilaĝaj loĝantoj (1970.01.01.)	Provizitaj per kondukita akvo (%) de la vilaga loĝantaro 1960	1970	1975
Baranya	221 537	6	27	32
Bács-Kiskun	382 566	13	38	44
Békés	312 698	7	34	48
Borsod-Abaúj-Zemplén	502 987	10	22	28
Csongrád	187 512	12	45	52
Fejér	272 220	10	23	33
Győr-Sopron	237 691	1	6	14
Hajdú-Bihar	305 306	5	36	73
Heves	248 059	8	28	49
Komárom	159 825	28	43	53
Nógrád	191 620	6	18	28
Pest	744 354	10	30	46
Somogy	292 541	5	26	33
Szabolcs-Szatmár	496 749	–	10	19
Szolnok	263 170	9	44	52
Tolna	218 455	10	52	64
Vas	193 212	2	25	36
Veszprém	273 937	17	38	45
Zala	188 597	3	14	41
Entute	5 693 036	8	30	40

Kondukita akvo kreas per sia abundeco pli altnivelan vivmanieron. Kompreneble tiel kreskas la uzita akvomaso, same la kloakakvo. Pro la volumeno ĝi nun jam ne estas forigebla per la kutimaj vilaĝaj metodoj, lasante sur kaj en la tero sekiĝi, penetriĝi, sed oni devas zorgi pri kanalizacio kaj purigado de kloakakvo per komunuma instalaĵo. Ankoraŭ troviĝas granda diferenco inter dimensioj de akvoprovizado, resp. kanalizacio: 68% de la tuta vilaĝanaro ĝuas kondukitan akvon, sed nur 13% vivas en kanalizita regiono. Pro la pli altaj kostoj kaj konstruaj malfacilaĵoj la kompanioj efektivigis pli volonte akvokondukadojn, kaj multe malpli realigis kanalizaciojn. Ankaŭ la loĝantaro postulis unuavice akvon. Ĝis 1975 kreiĝis ne pli ol 40 kompanioj por kanalizacio. Celo estas kompreneble, ke la komunumaj kompanioj pli kaj pli orientiĝu al efektivigo de kanalizacio en loĝlokoj.

Konsiderante la du jardekojn de la akvo-kompanioj kaj porkomunumaj akvoservo-kompanioj, oni povas konstati, ke tiuj agadis dum tiu etapo vere fruktodone, kaj per granda paŝo antaŭenigis la solvon de la taskoj pri loksignifa akvomastrumado. La faktoj konvene pruvis la necesecon de tiuj kompanioj.

Tradukis: E. *Fenyvesi*

[1] *Arida:* malfekunda pro troa sekeco (PIV)

[2] *Virko:* teknika konstruaĵo, necesa por funkciado de iu organizaĵo (fervoja ponto, signaliloj, irigaciiloj, ks.).

Regalu viajn gastojn

HUNGARA DOLĈAĴINDUSTRIA ENTREPRENO

per niaj delikataj biskvitoj!

KONSERVAS VIAN FIGURON, REDONAS VIAN SVELTECON



TABLOJDO "SACHARIMID"
en via kafo!
TARTRATA ACIDO
en teo kaj limonado

KUN DETALAJ INFORMOJ NI ESTAS JE DISPONO DE NIAJ KLIENTOJ
M I K Ö V 1025 Budapest XX., Nyári Pál u. 88. Pf. 75.
Telefon: 176–716, 573–088

Szilárd Bálint

La defraŭdanto

Adelaida kaj Roberto kune sidis en Venecio sub „Riva degli Schiavoni" – La ponto de ĝemoj – ĉe la tablo de la teraso de kafejo. Ili aparte forlasis Hungarion en 1956 pensante, ke plej rapide ili riĉiĝos. Ili konatiĝis en Vieno ĉe la grandkomercisto Maŭrico Berger, kie ili ricevis oficon. Roberto Varsa estis la ĉefkasisto, kaj Adelaida laboris kiel tajpistino. Nun ili estis kune en la urbo de lagunoj, kaj paroladis hungare. Ĉefe angloj ĉirkaŭis ilin. Krom la angloj ili gapadis la maron kaj la domojn de la insulo San Giorgio. S-ro Varsa reflekse ekpremis en sia poŝo la Browning-pistolon.

– Vidu, kiel oscedas tiu gondolisto – diris Adelaida – s-ro Berger kutimis ĉi-maniere oscedi, kiam oni enportas por li la gazetojn.

Roberto Varsa silentis kaj rigardis la maron.

– Kion vi pensas, kiam ni revenos, ni ricevos pli altan salajron? – demandis la virino.

Varsa abrupte delasis la pistolon kaj kun kolero alten levis sian manon:

– Ni ne parolu ĉiam pri la kontoro! Ne pro tio ni estas en Venecio . . . En Vieno ni estas sklavoj kaj ĉi tie grandsinjoroj . . . rigardu la maron, la palacojn, la gondolojn . . . rigardu ĉion, kvazaŭ vi vidus ĉion laste!

Adelaida silentis kaj votis ne paroli plu pri la kontoro. Ili forlasis la kafejon kaj komencis promenadi al la direkto de placo S-a Marko. Ili brakoplektis kiel geedza paro, sed kvazaŭ ili estus sentantaj iom malbonan animstaton.

– Diru al mi – diris la virino – ĉu decas tiel konduti kvazaŭ ni estus edzo kaj edzino? . . . Precipe, ĉar vi estas edzo de alia virino!

– Ĉi tie konas nin neniu! Ĉi tie oni tiel povas vivi, kiel oni volas . . . ĉi tie estas la urbo de la amo kaj vivo!

La viro strikte ĉirkaŭpremis la virinon kaj abrupte haltis. Ĉe la ponto de ĝemoj estis videblaj la malvastaj fenestroj de la malliberejo, kie dum la pasinta tago ili timtremete rigardis la terurajn plumbkamerojn.

– Se mi estus ĉi tie enkarcerigita, ĉu vi vizitus min? – demandis Roberto.

– Kiel vi povas diri tion? – diris Adelaida kaj pli forte premis la talion de la viro.

Ili promenadis plu. La virino vigle klarigis pri la beleco de preĝejo Santa Maria Maggiore, sed la penso de la ĉefkasisto tute aliloke vagadis. Li pensis pri tio, ke eble jam oni kontrolis la kason en la kontoro kaj la posedanto de la entrepreno s-ro Berger severe rigardas la librotenadojn kaj kun indigno diras: „Tiu Varsa . . . tiu fripono . . . kiamaniere li povis defraŭdi ducent mil ŝilingojn".

La viro abrupte reviviĝis kaj diris:

– Ni iru por vespermanĝi! Al la plej multekosta restoracio! – kaj kriis al gondolisto, vokante lin.

Ili ambaŭ ekiris al la gondolo kaj en ĝi sidante sub la nigra baldakeno ili interkroĉiĝis en la mallumo kaj senvorte rigardis la malgrandan meĉon sur la nazpinto de gondolo. Roberto tiel sentis, ke tiu momento estas la lasta en lia vivo, kiam li ne bezonas timi, ke oni tuj arestos lin en la nomo de la leĝo.

– Ĉu vi edziĝos al mi? – demandis la virino, kiu ege enamiĝis al la ĉefkasisto, kaj estus sekvinta lin tra ĉiu obstaklo.

– Vi restos la mia eterne! - respondis la viro mistike; li pensis pri tio, ke estus bona solvo, se la virino memkompreneble divenus la defraŭdon. – Se ne alimaniere, la morto kunigos nin! – finis la paroladon la viro.

– Ni ankoraŭ havas tempon paroli pri tio! – ridetis Adelaida. – Vi estas tre stranga . . . se mi parolas pri la oficejo, vi tuj koleriĝas kaj vi ĉiam parolas pri la morto!

La gondolo trankvile naĝis sur la maro, sed la virino iĝis pli malkvieta.

– Mi defraŭdis! – ekparolis la viro preskaŭ krude.

Adelaida eksaltis kaj volis salti en la kanalon, sed la viro detenis ŝin kaj diris:

– Vere mi defraŭdis . . . ĉar mi amas vin . . . mi volis tion, ke vi estu tute la mia . . . ni ne estu ĉiam sklavoj, sed unufoje riĉuloj, kiuj ŝutas la monon kaj ĝuas la vivon!

Sed Adelaida estis obstina. Dum kelkaj tagoj ŝi ĝuis la belecon, la senzorgan vivon, tial ŝi esperis ke ekzistas solvo. Ŝi proponis, ke ili provu pruntepreni monon kaj repagi la sumon al s-ro Berger. Fine ŝi demandis:

– Kiom da mono vi . . . prenis?

– Ducent mil ŝilingojn . . .

La virino kiel lignobloko falis sur la viron. Li iĝis muta, ankaŭ ŝi jam ne povis plori. Roberto komprenis, ke la silento estas la konsento. Ambaŭ ili sidis en la gondolo, kiel du kondamnitoj, kaj la gondolo naĝis sur la nigra akvo, kiel funebra ĉaro.

– Ĉu ni skribos adiaŭo-leteron? – demandis la virino.

– Jes, en la hotelo . . . ni trinkos ĉampanon . . . ni atendos la matenruĝon . . . kaj ni rigardos la maron, kiam la revolvero faros punkton pri la maljusta vivo.

– Eccola! – kriis la gondolisto.

Ili estis antaŭ la hotelo. Roberto donis grandan sumon al la gondolisto, kiu feliĉe, sed suspekteme akceptis ĝin. Ĉe la blanka tablo ili elektis la plej grandprezajn manĝaĵojn. Kiam la viro volis diri toston okaze de la lasta vespermanĝo, Adelaida ekkriis:

– Haltu!! Aŭskultu! - kaj komencis legi la gazeton:

„Maŭrico Berger la konata Viena grandkomercisto fuĝis al nekonata loko. Li neniigis ĉiujn dokumentojn, aktojn kaj kunportis la tutan monhavaĵon. La valoro de meblaro kaj stokoj apenaŭ estos sufiĉa por la lasta salajro de la dungitoj."

La viro kaj virino mute rigardis unu la alian, kaj preskaŭ en la sama momento ili ekparolis:

– Kion ni faru post tio ĉi?!

* * *

Kara Leganto! Mankas la fino de tiu ĉi historio, tial la redakcio petas vian helpon por fini ĝin. Bonvolu sendi ne pli ol 30 tajpitajn liniojn. La du plej bonaj aŭtoroj ricevos libropremion kaj la tekstoj aperos en Hungara Vivo.

Alloga lernilo

Praktika Bildvortaro de Esperanto. La bildojn desegnis Corinne Clarke kaj Ray Burrows. La tekston kompilis Language Services. Eldonis: Oxford University Press, 1979. 96 p., 23 cm. Prezo: 12,– ned. gld. (Por Hungario 150,– forintoj.)

Ĉar Esperanto por la plimulto el ni estas nur lingvo kultura, sed ne hejma, pri praktikaj aferoj (kuirejaj iloj, instalaĵoj de aŭtomobiloj, ktp.) la scio de eĉ bone parolantaj (kaj verkantaj!) esperantistoj estas tre modesta. Ordinare ni uzas Esperanton por temoj tre altflugaj kaj abstraktaj, kaj ni ne scias la nomojn de la aĵoj, kiuj ĉirkaŭas nin.

Gravegan helpon por la forigo de tiu ĉi manko donas *Praktika Bildvortaro de Esperanto*, kiu konigas al ni 2000 ĉiutage necesajn vortojn pere de 76 paĝoj da multkoloraj plaĉaj ilustraĵoj.

La ilustraĵoj – kaj la vortoj – estas ordigitaj laŭ temoj. Mi menciu nur kelkajn tiajn temojn, en kies prezento la ilustraĵoj signifas unikan avantaĝon: laboriloj, homa korpo, bestoj, plantoj, aŭtomobilo, sportoj, koloroj ktp. Jam el tiu ĉi listo evidentas, ke la libro bonege taŭgas tiel same por komencantoj, kiel por maturaj esperantistoj. Komencantoj – precipe infanoj – ĝojege foliumos ĝin pro la okulkaresaj belaj koloroj kaj la plezuro trovi la kernan vortaron de difinita temo sur unu paĝo; maturaj esperantistoj danke akceptos la praktikan, facile konsulteblan libron, per kiu ili povos ŝtopi la breĉojn en sia lingvoscio.

Ne estas malfacile antaŭdiri, ke tiu ĉi libro fariĝos unu el la plej popularaj eldonaĵoj de la kuranta jaro.



Vinstrata mistero

Johán Valano: Ĉu li bremsis sufiĉe? Krimromano, originale vertika en Esperanto. Eldonis: TK-Stafeto, Antverpeno – La Laguna, 1978. Bel-literatura Eldon-serio 39. 128 p., 21 cm. Prezo: 12,– ned. gld. (Por Hungario 150,– forintoj.)

La romano *Ĉu vi kuiras ĉine?* en la jaro 1976 gajnis la distingon „La verko de la jaro", kaj ĝia mistera aŭtoro, Johán Valano fariĝis persono vaste konata en Esperantujo. Nuntempe jam eĉ flavbekuloj scias, ke tiu „mistera" persono estas Claude *Piron*, kiu pli frue jam faris ne malmulte por eternigi sian nomon en la Esperanta literaturo.

Tiun romanon sekvis la poemaro *Malmalice*, kaj nun Valano revenas al la populara ĝenro de detektivromano. Jam lige kun *Ĉu vi kuiras ĉine?* recenzistoj konstatis, ke Valano regalas nin per tia poramuza literaturo, kian vere ni bezonas. Grava funkcio de la Esperanta literaturo ĝis nun estas la lingva edukado, kaj estas evidente, ke tio povas esti efika, nur se libroj atingas multajn homojn. La romanoj de Valano eminente taŭgas por tiu celo. Li lerte teksas interesan historion, en la centron metas simpatian kaj vivantan personaĵon (la detektivon Jano Karal), kaj evitas ĉian senbridecon en la historio kaj prezentmaniero. Ni povas fiere diri, ke nia *poramuza literaturo* nepre estas pli *literatura*, ol tiu de la naciaj lingvoj, tamen ĝi estas ne malpli *amuza*.

La vera atuto de niaj poramuzaĵoj estas la *stilo*. Stilo klara, pura, kaj ne fanfarone, sed rafinite arta. En naciaj lingvoj policromanoj plej ofte havas stilon absolute barbaran: ili efikas kriplige al la lingvouzo de la legantoj. Niaj poramuzistoj – inter kiuj grave elstaras Valano – per ne grandiozaj, sed atentokaptaj historioj igas la esperantistojn legi frazojn trafe formulitajn, harmoniajn kaj malkliŝajn.

Estas malfacile ion diri pri la romano mem, ja bonedukita rezenzisto ne rajtas malkaŝi la nomon de la murdinto. Li povas nur certigi, ke la enketo de Jano Karal estas interesa, kaj fine li sukcesas ekscii, kiu murdis Aleksandron Jendrik, iniciatinton de grava konstruprojekto en la urbeto Valmu. Ĉu la albana mekanikisto? Ĉu iu el la loĝantoj de Vinstrato, kiuj havis bonan kaŭzon por malami la arkitekton? Ĉu iu alia?

Por ekscii tion, ne hezitu aĉeti tiun belaspektan libron, kiu certigos al vi ne nur agrablajn leghorojn, sed ankaŭ donos al vi eblon poluri vian Esperantan lingvouzon.

V. *Benczik*

Science pri la Internacia Lingvo

Lingvistikaj aspektoj de Esperanto. Scienca analizo far John Wells. Eldonis Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (Universala Esperanto-Asocio), 1978. 76. p. 23 cm. ISBN 92 9017 021 2. Prezo 12,00 nederlandaj guldenoj.

Kiu deziras laŭ lingvistikaj kriterioj priskribi iun fenomenon de Esperanto, plej ofte vane traserĉas bibliotekojn kaj arkivojn, restas por li kiel kompara ebleco nur la priskriboj de alilingvaj fenomenoj laŭ la necesaj postuloj.

Dum la periodo de historia lingvistiko plejparto de „seriozaj" lingvistoj okupiĝis nur pri la antikvaj lingvoj, respektive pri historio de iu tradicia lingvo. Esperanto je la unua vido tiajn tradicojn ja ne havas, en ĝia viva funkcio „ne troviĝas superleksikaj kaj supergramatikaj elementoj de miljara etna kulturo".

La sekva erao – karakterizebla per ĉion priskribema pozitivismo – deziris deskripti (E-lingva termino de J. Wells) la multfacetecon de la mondo, kulturoj kaj ankaŭ de la lingvoj, sen diveni kaŭzojn de fenomenoj. Ju pli nekutima estis iu fenomeno, des pli priskribinda. Esperanto eĉ tia ne estis.

Lingvistoj-idealistoj (en frua epoko inkluzive filozofojn-pedagogojn) deziris por la

bono de homaro krei iun komunikilon, kies elementoj iamaniere por ĉiuj povas esti komuna. Pro manko de lingvistika teoria bazo ili ĉefe uzis leĝojn de logiko (kaj iaspecajn konstatojn de metafizika filozofio eĉ matematikeca) kaj la proprajn poliglotajn empiriajn spertojn. Esperanto mem kreiĝis en tiu periodo.

La abundeco de priskribitaj lingvoj kondukis al komparo de fenomenoj en diversaj lingvoj. Rekoninte samajn elementojn aŭ fenomentojn en historie neparencaj lingvoj ekmarŝis kompara lingvistiko kaj lingva tipologio. Tiu kondukis al konstatoj pri universalaj aŭ plej kutimaj lingvaj reguloj. La terorion pri „universalaĵoj de lingvo" (Titolo de epokkomenca monografio de J. Greenberg el 1963.) subtenis ankaŭ teorio pri interna „genera" funkcio de lingvo (lanĉita de N. Chomsky 1957). (Paralele apero, resp. disvastiĝo de pluraj nelingvistikaj teorioj kaj metodoj: sistem- kaj informscienco, dialektiko ktp.)

Tiuj jam alportis kriteriojn, per kiuj analizi fenomenojn de lingvo, kiu laŭ sia funkcio deziras esti optimala komunikilo – jam estas multe pli efike.

Verko de J. Wells estas – ĝis nun, bedaŭrinde – unika en tio, ke utiligas jenajn atingojn, spertojn de ĝenerala lingvistiko ne nur por kelkaj fenomenoj, sed preskaŭ por la tuta tradicia sistemo de Esperanta parol-, respektive komunikadsistemo. Mi esperas, ke ĝi estos bona deirpunkto de plivasta lingvistika analizo de ĉiuj fenomenoj de Esperanto, deirpunkto de analizoj, kiuj povas doni gravajn atingojn ankaŭ por la ĝenerala lingvoteorio, per demonstro de novaj eksteraj (nelingvaj) kaj internaj (memreguliga sistemo) leĝoj de la homa lingvo.

Neniu lingvistika nespertulo devas ja timiĝi, verko de Wells ne estas sekva kaj abstrakta teoriumado, ĝi estas didaktiko kaj stile tre leginda prezento de fonetiko, morfologio, sintakso semantiko kaj leksiko de la Internacia Lingvo. Ĝi donas al la laika, sed klera kaj plukleriĝema leganto la entuziasmigan rekonon, ke nia „arbitre kreita" lingvo estas unu el la plej naturaj; en tiu nobla senco de la vorto, kiu la naturon konsideras viviga medio de homo.

Tiun rekonon helpas la abundo de trafaj komparaj lingvaj ekzemploj la – neplena, sed reprezenta – fontindikaro (bibliografio) kaj la indekso de terminoj.

Resume: nepre leginda por batalantoj kaj simpatiantoj de pli justa solvo de monda lingvo-problemo.

T. *Vaskó*

Originala poezio

Ludmila Jevsejeva

X X

Ne decas al poet' soleci.
Li vivas en sentem' kaj vanto.
Al li necesas admiranto
por lin apreci.

Al filozofo, scienculo
Soleco pli konvena estas,
sed ĉe poet' – ĝi manifestas
pri pozemulo.

Ne povas vortmuzikon planti
Li sen dankema aŭskultanto,
Sen ekzaltita aplaŭdanto
poet' komencas false kanti.

Aldo de'Giorgi

METAMORFOZO

Vi estis fantasta,
perfekta,
serafa vizio
(iom afekta).
Implicis en vi
virtaro ĉia.
Vi estis . . . . . .
Kotenfalinta nun:
ho, Dio mia!
Sniff! Neniu dubo:
lilio putriĝinta
pli stinkas
ol ĉiu rubo.

Adalberto Hules:

VESPERKANTO

Eksonu, vesperkanto,
ĉiele stelo lumas,
en ĉambro lamp' elektra,
eksonu, vesperkanto.

Ja kantas etaj griloj,
la birdoj same ja kantas
kaj kantas la steloj ĉiele,
ankaŭ la homo kantu.

Odoras la floroj,
bovo muĝas, porkid' krietas,
la homon oni diras saĝa,
ankaŭ la homo kantu.

Oni fabelas, ke lin kreis Dio;
nur dio scias, kial li lin kreis,
li kreis la floron kaj porkidon,
li scias ja, kial.

Eksonu, vesperkanto,
kanti estas certe permesate,
pri aĵoj tri mi scias,
eksonu, kanto.

Julio Varga

KIEL ARANEO

Mi nokte, kaŝe teksas la poemojn
– samkiel araneo sian reton –
kaj ĉiam trovas mi fadenojn: temojn,
ja io ene diktas la soneton.

Nur anguleton, ho Indiferento,
donacu, (mi ne zorgas pri la kvanto)
kaj min obsedas sankta, sorĉa sento -
. . . jam preta iĝis mia reto: kanto.

Ĝi bela estas eble, sed ĝi donos
al mi neniam mondan famon, gloron,
sed se ĝi kaptos sole unu koron:

ho, mi trezoron grandan jam disponos,
kaj karesados – plena de la riĉo –
la fadenetojn aĉajn kun feliĉo.

Attila Hlavathy

SKIZOFRENIO

Ascendinte en maten' la tramon,
mi prezentis al mi la bileton.

Mi salutis min kaj resalutis
alveninte la prelegĉambregon,
mi kvitancis kun kompenso danka,
kiel brile ree mi lekcias,
kun buŝ' preskaŭ malfermita
min mi priatentis,
frazon ĉiun kun zorgem' notinte.

Mi purigis kaj turnis tagmeze
la kovrilon sur la manĝotabl',
al manĝaĵo portis mi aparte
el paprik', vinagro, pipro, sal'.
Bonan apetiton mi deziris,
esperante lasi la duonon,
enpoŝigis mi kun eleganto
la trinkmonon bone merititan,
en espero de l' revid' afabla
la manĝon deziris mi je mia san',
kiu, dankon, estis tre bongusta.

Mi atendis ĉirkaŭ dek minutojn
en vesper' pri veno mia fine,
(eble, tiom alkutimiĝante,
min surprizus pli la precizec').
Vangon kompreneman faris mi atente,
zorge prirakonte, zorge aŭskultante
al mi dum la tago okazintan,
estis tiom bone senti
la komprenon mutualan.
Kun kor' iĝinta malpeza,
kun kis' longa kaj sincera
al mi diris mi: adiaŭ!

Julius Balbin

IMPERIO DE L' KOROJ

Spite al tiom da homoj ofte demandantaj:
„Kial vi verkadas poemojn en Esperanto?
En ĝi ja nek naskiĝis eĉ unu popolkanto,
nek brilas ĝi tute per facetoj diamantaj.

Lingvo artefarita, sen ia mondprestiĝo,
konkerinta neniun landon, neniun genton –
kiel do ĝi kapablas esprimi sentimenton?"
Spite tiujn dubantojn pri ĝia kulturiĝo,

daŭrigas mi persiste eldiri en ĉi lingvo
miajn plej intimajn sentojn. Ĉar eĉ se la klingo
de ĝia glav' ne akras sufiĉe por mondregno,

ĝi pompas kiel esprimil': belsona, fleksebla,
montranta la strukturon de l' genia desegno –
do l' homajn korojn konkeri neniel tro febla.

John I. Francis

BREMSU LA JAROJN

Bremsu la jarojn
kaj permesu al mi konstati mian eston.
Netolereble
ke la aspiro estas jam bedaŭro
antaŭ efektiviĝo.

Ne morton timas mi,
sed la impeton je kiu mi
malgraŭ kroĉemo
raketas
al estingiĝo.

Forsibli povre ankoraŭ aspirante
mi trovas trompe;
agoniante
antaŭ plenspiro de la viv'
netolereble.

Mi ne toleros ĝin;
mi ĝin ne fronios.

Zora Heide

MIA AMO

Sur la junecaj kampoj la krepuske sternitajn sentojn,
nokte ebriigitaj,
mia amo plukis sibarite
de sur periantoj perlamote irizaj
kolektante la amrosajn gutojn
antaŭ la reveno de la inkandeska suno.
Per fadenoj oraj de mia sindonemo
ĝi teksis tapiŝon grandaniman
sur kiu majeste promenis
li,
kontenta ŝejko en sia plaĉivola haremo
en kiu eĉ sinteze fabrikitan amon li ne emis liveri.
Tri magiajn vortojn – mi amas vin –
flustris plorante la efektaj okuloj de mia animo,
dum li per kartona knuto
forprenis velurajn kurtenojn de mia interno,
eltiris la koron de mia lemura amo
kirlegante torturemfaze – mi ne amas vin –:
ĝin, la povran estaĵon, li boksis knokaŭte,
dum histeria amaso, ĉirkaŭ la matĉa areno, jubilis freneze.
Tie planken sangis la koro de mia mortbatita amo
tra sombraj poroj de mia sufero;
animo mia venis funebrodrape
la mortontan miokardion mimozkovrante,
dum lia triumfo miksigis kun la sango
de miaj tombomutaj
animo kaj koro.

EGER

Varmo- kaj lumorespegula filmo por vitrumoj

Garantio por 5 (kvin) jaroj, ekde ĝia apliko

Ĝi estas mendebla:
HEVES MEGYEI TANÁCSI
ÉPÍTŐIPARI VÁLLALAT
3300 EGER
KLAPKA U. 11.
Telex: 63337 Tel.: 16-62

La kosto de la filmoj
PXV–1 aŭ PV–2, aplikitaj
sur montraj fenestroj, sen risko
de danĝero pro paliĝo de la filmoj
kaj per vitro sen spilitigo
dum mallonga tempo kompensiĝos.

ÜGP Intermuro

Ĝin fabrikas kaj vendas:
HEVES MEGYEI TANÁCSI ÉPÍTŐIPARI VÁLLALAT
3301 EGER
Klapka u. 11.
Telex: 63337



Serpentino

Nun ni prezentas al la karaj legantoj novan ludon. Sed jen la problemo: kiel solvi ĝin? Unua paŝo: oni devas komenci. Kaj memkompreneble en la supra maldekstra angulo. Ni donas la difinojn same kiel ĉe la krucenigmo. La solvoj estas kvar-kvin literojn longaj vortoj, kiuj per unu litero kroĉiĝas unu al la alia, tiamaniere formantaj ĉenon. Sed la ĉeno estas samtempe specifa serpentino, tio signifas, ke oni devas sekvi la dikan linion. Per la solvo oni devas iri en ĉiu senpara vico de maldekstre dekstren kaj en ĉiu para de dekstre maldekstren. Por helpi Vian kaprompadon ni skribis en la kvadratoj ciferojn. Memkompreneble ĉiu cifero signifas ĉiam la saman literon. Por plia helpo ni skribis la literojn en la kvadratoj apud la diagonaloj. Cetere la solvo (nomo de fama esperantisto) troviĝas laŭ la diagonaloj. Ensendi sufiĉas nur tiun nomon. Memkompreneble premioj atendas la sukcesontojn!

Per tio nutras nin la ĝardeno (R) – Dekduono de la jaro (R) – Ĝi ŝirmas la koron kaj la pulmojn (R) – Aperturo faranta la ŝtofojn pli firmaj kaj brilaj (R) – Rumandevena itala kantistino (ZEANI) – Forte sin antaŭenŝeti (R) – Vagonaro (R) – Strigospecio en muroj kaj ŝtonoj (R) – Etulo de granda rabobesto (-o) – Informas – Festo (R) – Emo por ĉiam nei (R) – Faras ridinda – Tion donas la longa vivo (R) – Ŝokefiko (R) – Subtera trajno (R) – Belegi (R) – Nelabila (R) – Akvo, sed super cent grandoj C (R) – Legaĵo (R) – Speco de teksaĵo (R) – Tio staras malantaŭ la kemia simbolo Na (R) – Enspiri (R) – Respubliko en Soveta Unio (R) – Konscie lasi preteratente (R) – Fortikaĵo (R) – Enhavo de cigaredo (R) – Tio limas la bildon – Peti, sed iom pli forte (R) – Normo (R) – Emociplena poezio (R) – Valizo – Sekvi la ordonon – Akvo faras tion pereigante la kulturkreskaĵojn (R).

Imre *Szabó*



Ekkonu la klasikajn romanojn *Kastelo de Prelongo, ĉu li?* ktp. per rerakontaĵoj de V. Benczik.

228 p. 29 cm.

Prezo: 15,– ned. gld.

* Ekzameno sen risko *

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

Kain kaj Abel
(Sándor Szathmári)

„Kain kaj Abel" enhavas ĉiujn signifajn novelojn de la talenta Esperanto-verkisto Sándor Szathmári, kiuj ĝis nun ne presiĝis libroforme.

1. Kiu novelo finiĝis per la frazo: *„Tiamaniere mi alvenis fine al la decido, ke mi edzinigos ŝin."*?
2. En kiu novelo la ĉefheroo estas Kristoforo Kolombo?
3. Kial la titolo de la libro ne estas *„Kaino kaj Habelo"*?

La limdato por la sendo de la respondoj estas unu monato post la apero de la revuo.

●●●●●●●●●●●● Malplena Vortaro ●●●●●●●●●●●●●●

agrafo – Antikva broŝo (plej ofte farita el oro) sur la vestoj de aristokratoj.
ĉam-pano – Speciala panspeco, ŝatata en la ĉina regiono Ĉam. Reakciuloj insistas pri la franca deveno de la vorto.
kunefiko – Erara vortkunmeto, ja laŭ la vortfaraj reguloj adverba finaĵo estas elizienda.
liliputino – Malaltkreska fraŭlino kun dubmorala profesio.
Mamono – Nomo de Biblia heroo, kiu estis freneza por virinaj brustoj, kaj elspezis tiucele ĉiun sian monon.
mer-kredo – Pratempa religio.
mikrobo – Tre malgranda virina vestaĵo, laŭ iuj asertoj videbla nur per mikroskopo.
piedestalo – Luksa liberaera brutejo farita el bronzo aŭ marmoro, starigita kutime en parkoj, sur placoj ktp.
puto – Ekzotika tribo. Pro nekonataj kialoj la nomo de la tribaninoj estas tabuo en deca societo.

V.B.

Leterkesto

S-ino L. Marin, F. Bagnolet: La skiza studo pri la Esperanta romano de T. *Tyblewski*, aperinta en nia revuo, merite vekis vian intereson. Alvenis informoj de pluraj kompetentuloj, kiuj taksas ĝin grava paŝo el vidpunkto de moderna literaturscienco, kaj venos certe pluaj studoj volvantaj tiun fadenon. Prezentas kontenton por ni, ke en E-grupo de Parizo vi raportis pri tiu artikolo, kaj ke la rezulton de la diskuto, la rimarkojn vi komunikis al s-ro Tyblewski. Superflue mencii, ke tiamaniere oni kuraĝigas pleje niajn aŭtorojn! Do, apartan dankon!

Vladimir Bespalov, SU, Soĉi: Vian intereson pri Eo kaj sindikatoj, ties rilatoj, espereble ni povos foje kontentigi. Kiam vi refoliumis en niaj jarkolektoj, pluraj intervjuoj de sindikataj gvidantoj, ekz. kun Sándor *Gáspár*, nuna prezidanto de la Monda Federacio de Sindikatoj, krome informoj pri TUCEG, la intervjuo kun Jack *Jones* helpis vian scivolemon. Ni profunde komprenas, ke vi, havanta la taskon de sindikata prezidanto en lakto-entrepreno, preferas antaŭenigi Eon en la sindikata medio. Ni esperas, ke tiaspecaj artikoloj ankaŭ venonte havos signifon por via movada agado. Anonco aperis. Pri ŝanceliĝanta rado de aperado, legu sube.

Andrzej Pacholski, PL, Poznan: La „Ekzameno sen risko", kiun ni ĉijare revivigis, ebligas al la legantoj kontroli, eĉ klasifiki por si ilian scion pri la E-a literaturo. Ni atendas krome, ke ĝi prezentas samtempe distron, kaj por la ne-partoprenantoj ankaŭ lerneblecon laŭdezire. Tiaspecaj distre instruantaj ludoj instigas depreni desur la librobreto kelkajn librojn, serĉi, foliumi en ili, eklegi ie-tie, ekardiĝi, raviĝi de indaj belecoj, plie proksimiĝi al la artoj. Via interesemo koncerne vivon kaj historion de la hungara popolo ricevis – viadire – guojn pere de tiaj artikoloj; nia redakcio kun ĝojo legis tion, kaj faros sian eblon ankaŭ plu.

Josef Cremer, FRG, Bergheim-Glesch: Surprize longe kuris la poŝto kun niaj pasintjaraj lastaj numeroj, ĝis vi ricevis ilin, sed nia redakcio malkapablas multe instigi la ekspedejon kaj la plurlandajn poŝtojn. Niajn egajn zorgojn – kaj ne-prisilentitajn plendojn – pro la presejaj malfruoj, tia poŝta malfruiĝo nur pliigas. Niaj konstantaj klopodoj por la „drastan malfruiĝon" bremsi kaj tiri al pli norma periodigo, ofte malsukcesas, kvankam ni forte antaŭeniris rilate la aspekton de nia modernforma revuo. Kiel ĝis nun estis sperteble, ĉiu nia abonanto nepre ricevas – eĉ se kun prokrasto la (finfine feliĉe) presitajn numerojn! Neimageble do, ke Hungara Vivo restos ŝuldanto per 1–2 numeroj. Kiel kelkfoje jam menciite: la *redakcio* (sub egido de HEA) *nur* redaktas, la *presejo* (trošarĝita de multspecaj mendoj) presas jam kolore, sed limdat-fore. Sekcio de la poŝto havas la taskon *ekspedi* al la abonantoj, kies listojn allasas la *gazetagentejo*, aparta entrepreno. Dank' al favoraj cirkonstancoj ni ekhavis la financan eblon pliampleksigi kaj kolorigi nian revuon. Ĉiu abonanto estu certa: Hungara Vivo nepre aperigas *ses numerojn* en la jaro, kaj tiuj nepre atingos ilin, eĉ se malfrue. Aboni indas do, neniu perdos sian monon. Ni fidas, ke post fortaj klopodoj ni sukcesos igi pli regulaj la aperdatojn. Ĝis tiam ni petas paciencan atendon!

Korespondi deziras

Faida *Lavinia* bibliotekistino kun mezaĝaj geesperantistoj pri medicinaj novaĵoj, literaturo, R–78 226 *Bukureŝti* 32, str. Islaz 5. sektor 8. – Georgo *Kudrja* (44) pentristo kun skulptistoj kaj artpentristoj, SU–350 047 *Krasnodar* str. Temrjukskaja 64–39. – *Tátrai* Ferenc (41) laboristo serĉas esperantistinon por edziĝi. H–7400 *Kaposvár* urbo, Cseri út 10. – S-ro *Tókos* Árpád (22) serĉas amikojn por korespondi pri literaturo kaj E-o, R–4100, *Mercurea-Ciuc*, urbo, str. Scurtá 29. bloc J. – E-grupo en lakto-entrepreno serĉas amikan kontakton kun s-anoj en laktaj uzinoj, ks. interŝanĝi spertojn, event. reciprokaj vizitoj (Kaŭkazo, bordo de Nigra Maro): Esperanto-Grupo, Moloĉnij Kombinat, urbo *Soĉi*, str. Gorkij 87. SU–354 000. –S-ro Marco *Giovannoni* (23) kun gejunuloj samaĝaj, precipe hungaroj. Italujo, I–500–55, *Lastra a Signa* Via Alighieri 5. – Vitas *Andriuškevičius* (37) oficisto pĉt, ktm, precipe kun eksterlandaj litovoj. SU–234 910, *Utena*, Basanavičiaus 90–72. – Anastazia *Solymár* (15) lernantino kun samaĝaj geknaboj, H–7700 urbo *Mohács*, Dózsa Gy. u. 12. – *Śledzinski* Andrzej (30) kaj edzino (24) mekaniko-konstruisto, ekonomiistino, pri turismo, E-literaturo, artitekturo, mekaniko, precipe kun hungaroj. PL–44–100, *Gliwice*, ul. Libelta 12/2. – Kursanoj el la Krimeo, *Jalta*, SU–334–200: kursgvidantino *Kriger* Tatjana (28) programistino, pri E-movado, turismo, naturo. Glavpoĉt-amt, do vostreb. – *Savina* Anna (29) kuracistino pri psikiatrio: vojaĝoj, pentroarto, literaturo, medicino, muziko. Ul. Rudanskovo 49–53. – *Mokrecova* Lilia (29) kursgvidistino, pri pentroarto, literaturo, vojaĝoj, angla lingvo. Ul. Spendiarova 6–40. – *Nikitina* Anna (26) programistino, pri dancoj, liter., poezio, muziko. Glavpoĉt-amt, do vostreb. – Gelernantoj (16) pri div. temoj, en *Jalta*, adr. de kursgvidantino.

HUNGARA VIVO

Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** * Responda redaktoro: **D-ro István Nagy.** Arta redaktoro: **Éva Farkas-Tatár.** * Redakta Komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó Zsuzsa Varga-Haszonits** * Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechán, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193. H–1368. Telefono: 141–078, 334–194. * Eldonas: Hungara Esperanto–Asocio * Responda eldonisto: **Tibor Vaskó.*** Disvastigas la Hungara Posto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215–96–162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere au per postmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 66,– al eksterlando por unu jaro 78,– forintoj. * Peranto al eksterlando: KULTURA, Budapest, P.O.B. 149. H–1368 Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,– Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. – 79–7136 S.m.Ny. 4000 – Responda gvidanto: Béla Farkas direktoro

HU–ISSN 0018–7704. **Indexszám: 25 377**

Dum ekskurso,
ĉe sporto

en teo,

en limonado

Kun detalaj informoj ni estas je dispono de niaj klientoj
MIKÖV 1025, Budapest, XX., Nyári Pál u. 88. Pf. 75.
Telefon: 176–716, 573–088

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

DAV

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
Hotel Intercontinental – Hotel Gellért

Konsumturist